

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto



Septembro
2008

№8-9

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2008. №8-9 (166-167)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2008

Internacia tarifo: 32 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 18 eŭroj

Ruslanda tarifo: 390 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (2000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1200 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (700 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (400 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №8-9 (166-167).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 18 августа 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Vortoj de Komitatano Z.

UEA plu atendas Godoton

Ni skribas tiujn ĉi liniojn tiel baldaŭ post la UK en Roterdamo, ke la jam disponeblaj raportoj eble ne donas sufiĉan bildon pri tiu evento. *Libera Folio* denove diligente raportis, kvankam ĝi donis troigitan spacon al ne-esencaj detaloj kaj randaj fenomenoj, sed tia estas nuntempe la okcidenta ĵurnalismo, kiun allogas tio, kio “vendiĝas”. Klare la ĉefa kuriozaĵo estis la aresto de sveda obstinulo, kiu rifuzis porti nomŝildon. Malgraŭ ĉiuj streboj, insistitaj sisteme de Lapenna, stranguloj ne ŝajnas esti forigeblaj el la movada fasado. En estonteco ili povos kaŭzi pli da problemoj danke al prezidanto Dasgupta, kiu esprimis simpatian al la ekstrapaganca kongresano. Eraro, kiun al sia posteulo ne pardonos Lapenna.

En la raportoj oni apenaŭ trovas spurojn pri la festado de la 100-jariĝo de UEA dum la UK. Centran lokon ĝi do ne havis. La kongresa temo mem ignoris la jubileon kaj rezulte la kongreso rezoluciiis nur pri lingvaj rajtoj, kun devosente enŝovita mencio pri la 100-jariĝo. Nun, kiam plejparto de la jubilea jaro jam pasis, ni devas bedaŭre konstati, ke la asocio perdis unikan ŝancon por levi sian profilon inter esperantistoj. Ne estus juste skoldi pri tio la nunan estraron, ĉar agadplanon por la UEA-jaro necesis redakti multe pli frue. Certe ne temas pri jubileo de sama kalibro kiel tiu de la lingvo mem en 1987, kies agadplanon UEA publikigis kvin jarojn pli frue. La antaŭa estraro estus povinta elfosi tiun planon por adapti dekonon de ĝi por aktivaĵoj en 2008 loke, lande kaj monde. Tio ne estus malfacila, ĉar jubileojn oni finfine festas laŭ similaj ŝablonoj.

Kongresaj rezolucioj estas rito kaj apenaŭ gravas por la plua vivo de la asocio. Neniu memoras, pri kio temis tiu de la UK 1996 en Prago, sed la Pragan Manifeston oni memoras, almenaŭ laŭnome. Kio pli konvena momento por nova manifesto aŭ plano ol la 100-jariĝo de UEA? Neniu rezultis. La komitato eĉ ne diskutis pri nova plano. La decido ŝovi la diskuton al la komitata reŝajnas garantio por entombigo de la afero.

Pri kio oni cetere diskutus, se oni diskutus? Ne aperis propono pri nova plano. Diskuti pri aktualigo de la malnova plano estus nur kakofonio, se mankus proponoj de la estraro. Fine, diskuto sen gvidado kondukas al nenio. Jen la problemo: mankas gvidado en UEA. Renato Corsetti refrenis al la komitatanoj, ke ili plenumu sian rolon kaj mastru la asocion. Li vokis vane; la supera organo plu dormis en sia letargio. Ni tamen ne kulpigu la komitatanojn. Preskaŭ cent kapoj ne povas funkcii de si mem, sed iu devas ilin stiri, kaj tion devus fari la estraro. Eĉ ĝi kiel grupo ne sukcesus pri tio, sed necesus firma gvido de konkreta estrarano. Nature tiu estu la prezidanto, sed Dasgupta kun sia emo afabli al ĉiuj rapide venus en sakstraton. UEA estas do destinita plu atendi Godoton, ĉar denove ni devas meti la esperon ĉe la nova estraro, elektota post du jaroj, kaj ho ve, denove nia espero enkorpiĝas en Corsetti, kiu estos la elektojn...

Komitatano Z

Sur la kovrilpaĝo estas ĉi-jara kongresejo en Roterdamo kun Esperanto-flagoj kaj — en la fono — reklamobildo de butikoj de C&A (*Fotis Ziko van Dijk*).

Pluvoj kaj reguloj

Mi atendis nenion specialan el la Universala Kongreso en Roterdamo, ĉar la urbon mi kredis jam koni, ĉar mi volontulis du monatojn en la Centra Oficejo antaŭ 19 jaroj kaj vizitis ĝin iam kaj tiam ankaŭ post tio. Ne mirigis min eĉ tio, ke la ĉirkaŭaĵo de la Centra Stacidomo estis riparata kaj la kutimaj vojoj kaj tramhaltejoj estis lokitaj en provizoraj lokoj: ofte kiam mi vizitis Roterdamon io en aŭ ĉirkaŭ la Centra Stacidomo estis riparata. Tamen ne ĉio estis ripeto de antaŭaj spertoj.

La vetero estis eble unu el temoj, kiuj diskutigis kongresanojn. Nome, la kongresa semajno komenciĝis kun malvarmeta, pluveca vetero kaj al tio aludis ankaŭ la prezidanto de LKK Ans Bakker ten-Hagen, kiu iom strange parolis pri pluvo kiel larmoj de ĝojo. Por mi temperaturo ne estis io aparte malalta (kvankam en Finnlando somero kutimas esti pli varma), sed mi ankaŭ kutimiĝis al tio, ke se ekstere estas malvarme, interne estas varme. En Roterdamo klimatizigo kaŭzis, ke en la kongresejo estis pli-malpli same malvarme kiel ekstere. Meze de la kongreso la vetero tamen ŝanĝiĝis kaj fine de la semajno la suno dorlotis la urbon per varmego preskaŭ 30-grada. Tute taŭga fino por la kongreso.

Nederlando estas lando de bicikloj — kaj tio rimarkeblis tuj apude: irante trans straton ne tiom indus atenti la aŭtojn (ili haltis ĉe piediranto), sed biciklojn, kiuj estis rapidaj kaj kiuj ne haltis. “Tuj apude” nomiĝas ankaŭ tute freŝa gvidlibro de Humphrey Tonkin pri ĉirkaŭaĵo de la Centra Oficejo. Libro por konatigi ankaŭ la urbon, ne nur la oficejon, al esperantistoj. Vere indus iom rigardi apuden: de kelkminuta distanco el la oficejo troviĝis unu el tre brilaj muzeoj: Muzeo Boijmans Van Beuningen, kun ankaŭ kelkaj pentraĵoj kun aparta rilato al esperantistoj.

La ĉi-jara kongresejo estis unu el plej maltaŭgaj dum la lastaj jaroj:

Centra Oficejo respondas. Gbeglo Koffi kaj Hans Bakker. (Fotis Ziko van Dijk; http://commons.wikimedia.org/wiki/Image:2008-07-24_uk_gbeglo_kaj_bakker.jpg)

unue mankis granda salono. Salono Zamenhof estis fakte kunigo de du salonoj kaj en unu el ili eblis sekvi la programon nur el televida ekrano. Ankaŭ la reguloj de la kongresejo estis aparte striktaj: oni ne rajtis pendigi la tradician kongresan flagon en la ĉefa salono (fajrobrigado!). La nombro de personoj en salonoj estis tre strikte limigita kaj ankaŭ kontrolata. Se iu interesa programero allogis tro da kongresanoj, en iu momento envenis LKK-ano aŭ helpanto kaj postulis, ke troaj (tiuj sen seĝo) kongresanoj foriru, alikaze ni riskas, ke la fajrobrigado povas haltigi la kongreson. Tiu minaca informo, se ĝi veris, tamen ne estis publikigita ie. Al troa kontrolado apartenis ankaŭ skandaleto de la kongreso. Dumviva membro de UEA rifuzis montri sian insignon al LKK-ano, kiu kontrolis ilin komence de programero. La afero kriziĝis, ĉar LKK-ano vokis sekureciston de la kongresejo, kiu vokis policon kaj, malgraŭ posta montrado de insigno, la kongresano estis arestita kaj devis sidi du horojn en policejo, kie oni minacis lin per monpuno. Kaj la kongresa kuriero cenzuris la novaĵon pri tio! Mi kutimiĝis al reguloj en mia lando, sed ankaŭ al libera aplikeblo de tiuj reguloj. Ne konante la diskutojn inter la kongresejo kaj LKK, ne eblas diri, ĉu LKK interpretis la regulojn tro detale aŭ



ĉu ĝi estis postulata fari tion.

Krome mankis komputiloj: en biznes-centro 15-minuta retumado kostis 7,5 eŭrojn, ne mirinde ke tie liberis komputiloj, kaj nur meze de la semajno estis informita, ke en proksima biblioteko eblas uzi reton senpage. Ĝenerale la ejo ŝajnis esti tro ŝparema kun teknikaĵoj: koncertoj malfruis, ĉar paneis mikrofonoj, komputilo kaj projekciilo ne aperis ĝustatempe en salono, sed tamen aranĝeblis kun mirinda rapido.

Por mi unu el la plej interesaj programeroj estis en kleriga lundo la diskuto pri “Nia ne-oficiala historio”. Tie malnovaj aktivuloj rakontis pri siaj personaj spertoj dum kongresoj. “Mi renkontis tiun knabon (nun ĉ. 50-jaran viron) en infana kongreseto kie li kondukis malbone”, “Tiuokte mi konatiĝis kun via (apude sidanta mezaĝa viro) unua edzino”. Fakte lia unua fianĉino, kiel li tuj korektis. Unu el partoprenantoj el la publiko aludis eĉ al siaj kongresaj edzinoj, el kiuj parto estis edzinoj de aliaj viroj, kaj emfazis, ke se eblas kasanovi per Esperanto, la lingvo vivas, kiel li kutimas respondi al

☞ pĝ 4



dubemuloj. Indus havi tiajn rememorojn en ĉiu kongreso.

En mia tuttaga ekskurso manĝoj estis iom malmultaj, nur “tipe nederlanda” pano kaj aldonajoj. Mi estus esperanta iom malpli tipan, sed pli abundan. Tamen ankaŭ pasintjare la sperto estis la sama. Eble ne tiom temas pri tipe landa, sed “tipe UK-ekskursa”. Nu, fakte ni estis avertitaj pri tio en la programpriskribo kaj mi ankaŭ aŭdis, ke iuj aliaj ekskursoj havis pli ampleksajn menuojn.

Al surprizoj apartenis ankaŭ vicurbestrino, kiu faris sian tutan (preparitan) paroladon en la urba akcepto en Esperanto, sed kiam necesis ion aldoni, ŝi diris tion en la angla. Uzo de naciaj lingvoj estis en tiu kongreso eble pli rimarkinda kaj pli akceptata ol iam pli frue. Jam en la solena inaŭguro la landaj salutantoj estis petitaj diri “bonan tagon” en sia nacia lingvo por tiel demonstri la kongresan temon pri lingvoj. Interese, ke pluraj uzis ĉiujn oficialajn lingvojn de sia lando aŭ, se temis pri iu el mondaj lingvoj, iun minoritatan lingvon de sia lando. Ankaŭ en aliaj programeroj eblis aŭdi foje naciajn lingvojn. Ekzemple István Ertl komencis la programon pri tradukado en EU (se Esperanto estus oficiala lingvo) per prezentado en la hungara kaj diris, ke tiel eble sonus, se subite EU uzus Esperanton, nekompreneblan kaj nekonatan lingvon en sia agado.

Jukka Pietiläinen

Bjalistoko en 2009 Havano en 2010 sed kie en 2011?

Ĝenerala sekretario de UEA, Barbara Pietrzak, anoncis en la solena fermo de la 93a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo, ke la 95a UK en 2010 okazos en Havano.

La Estraro de UEA, kiu decidas pri la kongresurboj, elektis la ĉefurbon de Kubo, ne Moskvon, kiu estis la dua kandidato, kvankam Kubo jam gastigis UKon (en 1990), sed en Ruslando neniam okazis esperantista mondkongreso.

Antaŭ unu jaro estis decidite, ke en 2009 la 94an UK akceptos Bjalistoko, la naskiĝurbo de Ludoviko Zamenhof.

Rezolucio de la 93a Universala Kongreso de Esperanto

La 93a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Roterdamo de la 19a ĝis la 26a de julio 2008 kun 1845 partoprenantoj el 73 landoj por diskuti la kongresan temon *Lingvoj: trezoro de la homaro*,

Festante ĉi-jare la centjariĝon de Universala Esperanto-Asocio,

Notante la gravan rolon de lingvoj en la konservado de scioj kaj kulturoj, kaj en la ebligado de malsamaj aliroj al la mondo,

Rimarkante la daŭran diskriminacion kontraŭ lingvoj je ĉiuj niveloj kaj aparte kontraŭ la lingvoj de indiĝenaj popoloj kaj malplimultoj, kaj

Atentigante pri la valoro de la facile lernebla kaj neŭtrala lingvo Esperanto, kiu estas mem lingva trezoro de la homaro, kaj pri la pli ol centjara sperto de ĝia praktika utilo kiel ligilo inter kulturoj,

Varme **bonvenigas** la decidon de Unuiĝintaj Nacioj, ke la jaro 2008 estu Internacia Jaro de Lingvoj, kaj alte taksas la iniciatojn de Unesko en tiu kampo menciitajn en la mesaĝo de ties Ĝenerala Direktoro al la Kongreso,

Reemfazas la neceson doni egalan respekton al ĉiu lingvo, al ĉiu kulturo kaj al ĉiu homo en la mondo,

Alvokas la Esperanto-komunumon disvastigi Esperanton kaj ĝiajn valorojn de respekto al ĉiu homo kaj de egaleco inter ĉiuj homgrupoj, kaj per tio kontraŭbatali la malaperon de lingvoj kaj kulturoj tra la mondo,

Invitas al kunlaboro kun ĉiuj organizaĵoj kaj instancoj kiuj laboras por konservi lingvojn kaj kulturojn kaj defendi lingvajn homajn rajtojn,

Instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco, lige kun la kreskanta agnosko pri biologia diverseco, kaj

Proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado tra la mondo.

Mesaĝo de Unesko al la 93a UK

Ĉi tiu kongreso okazas je tute taŭga momento: duone tra la Internacia Jaro de Lingvoj 2008. Kiel esenca dimensio de homa ekzistado, lingvoj ĉiam estis en la kerno de la misio de Unesko, kaj ni ludas gvidan rolon en la kunordigado de agadoj tra la jaro. Fakte, lingvoj estas menciitaj en la unua artikolo de nia Konstitucio, kiu diras



ke la celo de la organizo estas “kontribui al paco kaj sekureco, stimulantante kunlaboradon inter la nacioj per edukado, scienco kaj kulturo por antaŭenigi universalan respekton por justeco, por la regado de leĝoj kaj por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj (...) sendistinge pri raso, sekso, lingvo aŭ religio”.

Ĉi tiu vizio daŭre gvidas la laboron de la organizo, kaj je la labora kaj je la normiga niveloj, en ĉiuj niaj kampoj de kompetento: edukado, sciencoj, kulturo kaj komunikado. Ni laboras por antaŭenigi plurlingvan edukadon kaj multlingvismon en ciberspaco, por savi endanĝerigitajn lingvojn, plifortigi indiĝenajn lingvojn kiel portilojn de scienca scio kaj scipovo, kaj por analizi la ligojn inter la praktikado de lingvoj kaj sociaj transformiĝoj. Nian agadon en la kampo de lingvoj antaŭnelonge plifortigis la kreado de Intersektora Platformo por Lingvoj kaj Multlingvismo.

Plie, Unesko laŭ sia propra naturo estas multlingva organizo: niaj gvidaj organoj laboras per naŭ lingvoj, kaj multaj paĝoj kaj temoj en nia Unesko-retejo estas seslingvaj.

Estante centra por la identeco de individuoj kaj reprezentante strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, multlingvismo estas nuntempe, en epoko de tutmondiĝo, pli ol iam ajn ŝlosila temo por la estonteco de la homaro. Tial la slogano, kiun ni kreis por la Internacia Jaro de Lingvoj esprimas klare sed elokvente, ke “lingvoj gravas”.

Kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kongreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco.

Tial mi deziras al Universala Esperanto-Asocio, al la organizantoj de la kongreso kaj al ĉiuj partoprenantoj plenan sukceson en iliaj diskutadoj.

Koichiro Matsuura

Ĝenerala Direktoro de Unesko

La popolo devas koni siajn heroojn

En la fermo de la 93a UK en Roterdamo estis anoncigitaj diversaj premioj kaj distingoj de UEA.

Premio Deguĉi estis starigita de Oomoto por ĉiujare premioj agadon, kiu pere de Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidaron en la spirito de Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. Pri la ricevanto de la Premio decidas la Estraro de UEA. La Premio konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj. Ĉi-jare ricevis ĝin Renato Corsetti, kiu strebas disvastigi Esperanton en la Tria Mondo, “ĉiam celante, ke al la novaj esperantistoj la posedo de la nova lingvo fariĝu rimedo por plivastigo de siaj spiritaj horizontoj kaj por persona kresko”.

La Estraro de UEA rajtas rekoni eksterordinare meritplenan agadon per **Diplomo pri Elstara Agado**. En 2008 ricevis ĝin du interretaj projektoj: *lernu.net* kaj *edukado.net*.

Lernu.net estas plurlingva paĝaro, kiu celas helpi al ret-uzantoj informiĝi kaj lerni Esperanton senpage kaj en facila maniero. *Edukado.net* estas retejo por instruistoj, prizorgata de Katalin Kováts. Ĝi celas subteni kunlaboron inter instruistoj, sed ĝi estas ankaŭ helpilo por memlernantoj.

Fondaĵo **Antoni Grabowski** de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo. Ĉi-jare la fondaĵo aljuĝis du egalrangajn premiojn, je la valoro de po mil usonaj dolaroj, al Ilona Koutny kaj Andy Künzli.

Ilona Koutny, hungara lingvistino vivanta en Pollando, kreis kaj dum dek jaroj animas la popularajn kaj rekonatajn Interlingvistikajn Studojn ĉe Universitato Adam Mickiewicz en Poznań.

Andy Künzli, svisa politologo, pli ol 15 jarojn laboris super sia monumenta enciklopedio *Universalaj lingvoj en Svislando*.

Subvencio Cigno estas donata por subteni agadon, kiu celas disvastigi Esperanton en evoluantaj landoj de la Tria Mondo. Ĝia valoro estas 500.000 japanaj enoj (ĉ. 2950 eŭroj). La subvencio finansas Miyoshi Etsuo kaj pri ĝia celo decidas ĉiujare la Estraro de UEA.

Ĉi-jare Subvencio Cigno estis asignita al la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) por ĝia projekto *Agado Srilanko*.



IJK eble estas la plej gaja esperantista kongreso
(Post vinguĝumado en Szombathely fotis Ulrich Matthias)

Sepdekjara junularo

La 64an Internacian Junularan Kongreson de TEJO en Szombathely (Hungario) partoprenis pli ol 350 homoj, kaj TEJO bonvenigas 120 novajn individuajn membrojn. Ĉiuj komune festis dum la IJK la 70-jaran jubileon de la fondiĝo de TEJO en 1938.

La komitato de TEJO kunvenis al sia jarĉefkunveno. Dum la kvar sesioj 26 anoj de la komitato kaj pluraj ĉeestantaj vizitantoj vigle diskutis la raportojn de la estraro kaj aprobis ĝian laboron.

Komence de la kunveno la komitato ĝoje bonvenigis novan landan sektion de TEJO: Junulara Esperantista Burundia Organizo (JEBUO) estis akceptita kiel 45a landa sekcio.

Unu el la plej popularaj servoj de TEJO estas la gastiganta reto *Pasporta Servo*, kiu jam de pli ol 20 jaroj faciligas vojaĝojn kaj renkontojn en la Esperanto-mondo. La komitato decidis renovigi tiun servon, kiu ĝis nun konsistis ĉefe el la papera adreslibreto. Estontece dinamika interreta datumbazo plifaciligos la servon. Jam la 2009a eldono aperos en freŝaj vestaĵoj kun nova vizaĝo. Malgraŭ la plivalorigo de la interretaj servoj papera eldono daŭre disponeblas.

Ankaŭ ĉi-jare la fonduso *Partoprenu IJK-n* povis helpi al la membroj de TEJO vojaĝi al la Internacia Junulara Kongreso de TEJO! Post longa cerbumado estis elektitaj la gajnantoj: Arina Osipova (Ruslando), Manal El-Tayar (Libano), Morayma Martínez (Meksiko), Daniel Moreno (Meksiko).

Laŭ <http://tejo.org/>

ILEI: La unua afrika konferenco

Finfine konferenco de ILEI okazis en Afriko, en la benina urbo Portonovo. Partoprenis 42 konferencanoj el Nederlando, Francio, Japanio, Ĉeĥio, Britio, Aŭstralio, Litovio, Italio, Togolando, Benino, Ebura Bordo, Burundo, Ganao.

30 jul 2008 malfermiĝis la konferenco per la hisado de la verda flago. Post la kantado de la himno *La Espero* estis solene prezentitaj salutmesaĝoj, kaj tuj poste okazis la akcepto de la urbestro al la esperantista delegitaro por komune manĝi tutamikece.

Venis la momento prelegi pri homaj rajtoj, sub la gvido de Renée Triolle, kaj poste de prelego pri plantoj je vitaminoj sub la gvido de Jean-Pierre Boulet, Lingva festivalo sub la gvido de Vladka Chvatalova, Lingva ludo sub la gvido de Ana Montesinos, prezentado de projekto *Mondo-rondo* de Latifou kaj la ekzamenoj sub la gvido de Mireille Grosjean.

Okazis multaj diskutoj pri plibonigo de la situacio de Esperanto en Afriko. La konferenco tre buntiĝas je multaj aktivecoj rilate al lingvo-kono, okazo renkonti nekonatajn amikojn, kultura festivalo dum kiam koncerto estis rave prezentita de Mayuko Tazima kaj de Hori Yasuo, kiuj dancigis ĉiujn konferencanojn je la sono de japana gitaro. La tuta ĉambro entuziasmiĝis, kaj aŭdeblis ĉie kantkrioj kaj dancaŝoj.

5 aŭg okazis la solena fermo per la voĉo de Aida Ĉiĝikaitè, reprezentanto de ILEI en la konferenco.

Kodjovi Francis Agbenou

Ameriko ekologie kongresis

La Sepa Tutamerika Kongreso de Esperanto en Montrealo (Kebekio, Kanado, 12–18 jul 2008), konfirmis la valoron de la regionaj kongresoj kiel vivanta forumo por interŝanĝi ideojn, starigi projektojn kaj trovi komunajn vojojn por pluvivigi la movadon kadre de komuna agado interna kaj ekstera.

La urbo Montrealo kaj ties universitato UQAM ofertis malmultekostajn loĝejojn kaj taŭgan sidejon apud la urbocentro kaj proksime de la malnova urbo.

La kongresa temo “Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj: diverseco por daŭripova evoluigo” ebligis prezenti serion da prelegoj kaj debatoj kun la celo pli konkrete kaj praktike studi kaj komprenigi la problemaron prezentitan pri la protekto kaj konservado de nia ekosistemo kaj tre aparte pri indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj.

Aliĝis al la kongreso 222 homoj el 24 landoj, el ili sep amerikaj landoj, nome, Kanado, Usono, Meksiko, Kubo, Kostariko, Gvatemalo kaj Ĉilio. La fakto, ke samtempe okazis la tutlanda kongreso de Esperanto-USA, konsistigis unikan ŝancon arigi grandan nombron da usonaj kaj kanadaj geesperantistoj kiel ne okazis dum multaj jaroj.

En la malfermo festparoladis prof. Humphrey Tonkin, kiu verve instigis la kongresanojn labori por “rekrei nian organizaĵon antaŭ la novaj tempoj” kaj emfazis ke “Zamenhof transdonis al ni la eblecon krei nian propran kulturon”.

Aliaj gastoj venis el Kostariko kaj Gvatemalo, José Carlos Morales kaj Ruben Ortiz, respektive, reprezentante de indiĝenoj ĉe UN-institucioj kaj en Centra Ameriko; aliflanke, Kora Brent-Palmer Utacite, reprezentante de indiĝenoj el Kanado. La kongresan temon reĝisoris José Antonio Vergara kaj Edmond Brent.

La programo estis tre riĉa je prelegoj, forumoj, praktikumoj, kurso por komencantoj, pluraj laborkunsidoj de la Amerika Komisiono (AK), laborkunsidoj de Esperanto-USA kaj tre interesaj fakaj ekskursoj lige al la kongresa temo. La vesperaj programoj same buntis per koncertoj de invititaj artistoj kebekiaj kaj esperantistaj kiel JoMo el Francio kaj Julian el Kubo.

Bonveniga koktelo de ESF kun antaŭparolo de Mark Fettes kaj vegetarana bankedo sukcese okazis, plus aŭkcio celanta pliigi la kason de la Amerika Fondaĵo kiu ege helpas al la evoluigo de estontaj projektoj de la AK prezentitaj en la kongreso, interalie, pri

klerigado kaj trejnado de centramerikaj geesperantistoj.

Oni devas aparte mencii, ke la publika eĥo pri la kongreso estis ege unika laŭ Boris Antoine Legault, kiu prizorgis la informan servon de la kongreso. Pluraj ĵurnalistoj de radiostacioj lokaj kaj naciaj, krom gazetoj kanadaj kaj ciferecaj raportis pri la kongreso kaj tre emfaze pri la kongresa temo, vizitis la kongresejon, laborkunsidojn kaj intervjuis kongresanojn.

Fine de la kongreso la Amerika Komisiono de UEA publike subskribis deklaron, konstatinte la laŭdindan kaj ripetindan kunlaboron inter diversaj esperantistaj instancoj por kongresi kontinent-skale; la allogan kongresan temon prezentantan aktualan problemon de la homaro, diversmaniere traktitan en la programo; la sindonan gastamon de la lokaj esperantistoj; la havigon de unika ebleco diskuti kun indiĝenoj pri lingvaj rajtoj cele al subteno de la lingva diverseco, kaj esprimis dankon al la Esperanto Klubo ĉe UQAM, Esperanto-Societo Kebekia, Esperanto-USA, Kanada Esperanto-Asocio, ESF, LKK-anoj kaj helpantoj pro la laboro farita; kaj invitis la esperantistaron amase ĉeesti la 8an TAKE okazontan en Brazilo en 2011.

Aparte estis aprobita la rezolucio pri la kongresa temo, kiu proponas konkretajn paŝojn por plu studi kaj studigi tiun problemaron diskonigante la detalojn de la dumkongresaj intertraktadoj kaj eklernoj.

Maritza Gutiérrez González

Kunordiganto

de la Amerika Komisiono de UEA

Montrealo. Al la kongresejo venis multaj ĵurnalistoj por intervjui nin kaj esplori Esperantujon (*Fotis Steven Brewer*)



BET-44 en Latvio

La Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) okazas preskaŭ ĉiujare ekde 1959 laŭvice en Litovio, Latvio kaj Estonio.

Ĉi-jare en julio al BET-44 en Ventspils (Latvio) aliĝis 151 homoj el 15 landoj — malpli ol duono de la pasint-jara 322-persona partoprenantaro en BET-43 (Šiauliai, Litovio).

La programo okazis ĉefe en urba lernejo. Okazis Esperanto-kursoj elementa, paroliga kaj perfektiga, kaj kurso pri la latva lingvo. La prelegoj temis, interalie, pri trafika politiko en Berlino, hodiaŭa Estonio, kosmologio de Martinus, gramatika graveco de vokaloj de Esperanto, la liva lingvo kaj livoj, japanaj literoj kaj ideogramoj (de Jamada Tadaŝi el Japanio), “origamio”, finna verkisto Mika Waltari (kiu verkis historiajn romanegojn, i.a. *Sinuhe*), teatraĵa monologo *La Prelego* verkita de Harold Brown (prezentita de lia vidvino Kerstin Rohdin).

Interesaj temoj, sed la reala prezento ne ĉiam taŭgis. Ne ĉiuj prelegantoj respektis horaron, intervenaj komentoj distras ilin kaj forgesigas la originalan temon, unuj parolis tro mallaŭte, aliaj laŭte sed torente rapide inundante la aŭskultantojn per troa scio. La pinto estis la preleganto pri “Tempe”: nur post la supozita fino de sia prelego li komencis klarigi, kio estas “Tempe” (iaj fungaj “fadenoj”, per kies helpo oni povas produkti frandaĵojn el sojofabo kaj tiel malpliigi la poluadon kaŭzitan de produktado de viando). Sur la tablo post lia prelego restis multaj aĵoj, pri kiuj li estis parolonta kaj kiujn li intencis gustumigi al ni, sed forgesis!

Okazis koncertoj: junaj gegitaristoj ludantaj repertuaron de kantoj de Esperantujo; muzikantoj, deklamantoj kaj kantantoj el inter BETanoj en “Internacia koncerto”. Rava estis la kanto de japanaj geedzoj Jamada pri la Verda Stelo. Ili havis la refrenojn sur longaj blankaj banderoloj, tiel ke la publiko povis kunkanti. Poste pluraj viroj surscenejiĝis por rekanti la tutan kanton kiel vira koruso.

BETanoj ankaŭ ekskursis buse kaj piede, ludis ludojn gvidate de Nora Caragea. La libroservo estis modesta, sed samĉambre oni vidis ekspoziciojn de du pentristinoj kaj unu dezajnistoj de medaloj kaj moneroj.

La adiaŭa vespero okazis en ĉemara subĉiela parko kun akordiona muziko kaj dancado.

Venont-jare BET okazos en Estonio.

Saliko

Brazilo: en etoso de emocia paco

Entute 330 homoj, inkluzive de manpleno da eksterlandanoj, partoprenis 12–16 jul la 43an Brazilan Kongreson de Esperanto en Fortalezo, en la Fakultato de Beletro de Federacia Universitato de Ceará.

La malfermo okazis en la rektorejo, kun ĉeesto de reprezentanto de la universitato kaj urbkonsilanto. Solene malfermis la Kongreson la prezidanto de BEL, José Passini, kaj festparoladis prof. José Leite Jr. Oni kanzonis, infanoj ludis teatraĵon, kaj oni kortuŝe omaĝis pioniron de la loka movado — Paulo A. Cardoso.

La kongresan temon “Infano — kia grundo!” oni prezentis dum tri sesioj, sub reĝisorado de D-roIVALDO A. Souza. Diskonigadon kiel apartan temon prezentis grupo el Brasília, dum tri sesioj, ĉefe pere de Francisco Mattos, eksprezidanto de BEL. La grupo proponis helpon per profunda, riĉa materialo por informado pri Esperanto en Brazilo.

Prelegoj, kursoj kaj ekzamenoj, en baza kaj progresiga niveloj, okazis en pluraj ĉambroj, tiel ke la tuta kongreso fakte montriĝis kiel impona kultura evento. Pastro Peter Knauer (Germanio/Belgio) dufoje celebris meson en Esperanto kaj ankaŭ brile prelegis pri “Kredkonfeso por nia tempo”. Spiritistoj kunsidis trifoje kaj eldonis novan numeron de *Almanako Lorenz*.

Artaj vesperoj okazis dufoje, kaj dancvespero unufoje, en nokta klubo ĉe “Plaĝo Futuro”. En la virtuala konferenco oni starigis kontakton kun la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, kiu okazis samtempe en Kanado. Oni reciproke salutis kaj raportis.

Okazis ankaŭ Kongreso de Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj Infankongreseto. BEJO aktive kongresis, elektis novan estraron kaj aljuĝis la premion *BEJO-ataŝeo* al Dominique V.C.Santos. La infanoj de la infana kongreseto prezentiĝis surpodie en la malferma kaj ferma ceremonioj.

La fermo, en etoso de emocia paco, okazis post Ĝenerala Asembleo, kiu fluis en mirinda harmonio kaj kunlaboro. La Lokan Kongresan Komitaton ĉiuj varme dankis per varma aplaŭdego. Ĉe la fermo, Angela Faria, el Juiz de Fora/MG, prezentis filmon pri ĉi tiu urbo, kie okazos la proksima Kongreso, kaj akceptis la verdan flagon. Ĝi atendas nin denove, en 2009! Ĉu vi jam enskribiĝis?

Paulo Sérgio Viana



La nova estraro de UFE (de maldekstre): F. Bartsch, A. Kadar, A. Piolat, X. Dewidehem, C. Nourmont kaj C. Hurstel.

Francio: la plej juna prezidanto

La Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE/Espéranto-France) kongresis en Martigues (Provenco) 8–12 maj 2008 kun 134 partoprenantoj el ses landoj.

Bone kaj sune disvolviĝis la tuta kongreso. Ĝi estis inaŭgurita kun la ĉeesto de la urbestro kaj de Seán Ó Riain, prezidanto de la Eŭropa Esperanto-Unio, kiu prelegis pri lingva kaj kultura diverseco en Eŭropa Unio.

La renovigita komitato de UFE elektis novan estraron: Xavier Dewidegem (prezidanto), François Bartsch (vicprezidanto pri informado kaj komunikado), Cyrille Hurstel (vicprezidanto pri eksteraj rilatoj), Claude Nourmont (vicprezidantino pri kulturo, eldonado kaj kongresoj), Armelle Piolat (sekretariino), Aleks Kadar (kasisto).

Xavier Dewidehem, nur 26-jara, verŝajne estas la plej juna prezidanto en la tuta historio de UFE.

Laborkunsidoj temis pri interasocia kunlaboro, regionaj federacioj, komuna franca Esperanto-revuo, vojaĝo al Kompostelo k.a. Krom UFE jarkunvenis la Provenca Federacio, la Grupo de la Esperantistaj Edukistoj, la Franca Katolika Esperanto-Asocio kaj Eŭropo-Demokratio-Esperanto.

Okazis multaj prelegoj, i.a. pri Provenco, pentrarto, beletro kaj Eŭropa Unio laŭ la Lisbona traktato. Disvolviĝis ekskursoj en la ĉirkaŭaĵon kaj Marsejlon, ekspozicio pri Provenco kaj paco, globluda konkurso kaj sprite gvidita aŭkcio.

Tre rimarkinda estis la drameca komedio de Lee Blessing *Sendependeco*, kiun la trupo *La Cikadoj* ludis kun granda talento. La kongresanojn regalis la muzikparo *Duoble Unu* per varia koncerto, migrante laŭ la bordoj de Mediteraneo kaj tra aliaj lokoj.

La landa kongreso estis bone raportita en lokaj gazetoj, radiostacio kaj reta televidkanalo. 9 maj en la ĵurnalo *Le Monde* aperis nova tutpaĝa anonco de Etsuo Miyoshi okaze de la Eŭropa Tago.

UFE

Hispanio: en nova loko

La 67a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en Cuenca 3–6 jul 2008. Cuenca estas malgranda provinca ĉefurbo en montara regiono de centra Hispanio, kie Esperanta aranĝo neniam okazis ĝis nun. Ĉirkaŭ 100 kongresanoj partoprenis, plejparte el Hispanio, sed ankaŭ el Francio, Germanio kaj Slovenio.

La temo de la kongreso estis *Lingvoj, Trezoro de la Homaro, Ilo por dialogo*; kaj la programo estis ĉefe kultura kaj literatura, kun valoraj partoprenoj de elstaraj membroj de la “Ibera grupo” kiel Jorge Camacho kaj Miguel Fernández.

La kongreso vekis grandan intereson en la urbo kaj estis amplekse raportita de la lokaj, provincaj kaj eĉ naciaj ĵurnaloj kaj radioj. La kongreso ankaŭ proponis al lokaj neesperantistoj senpagan bazan kurson de Esperanto, kiu estis tre sukcese gvidata de Pedro Hernandez.

Alejandro Pareja

Valamo: trinivela kurso

La 9a sinsekva esperantokurso en Popola Instituto de Valamo havis plezuron bonvenigi 23–27 jun 2008 kursanojn al tri kursoniveletoj: elementa, daŭriganta kaj konversacia. La instituto situas en la areo de la monaĥejo Valamo en la komunumo Heinävesi (Finnlando), kaj la entute 23 gelernantoj havis eblecon studi ĉirkaŭataj de belega naturo.

Por tri kursoniveletoj necesis tri instruistoj: krom Atilio Orellana Rojas kaj Tiina Oittinen kunlaboris ankaŭ Patrik Austin, instruisto laŭ edukado kvankam konata ankaŭ kiel muzikisto. Ĉiuj tri instruis kaj gvidis ĉiujn kursoniveletojn. En ĉiu grupo estis 7–8 gelernantoj. En la konversacia grupo estis tri eksterlandanoj (el Svedio, Estonio kaj Ruslando) kaj en la daŭriganta grupo du blinduloj. Surbaze de komentoj, kiujn donis la kursanoj, plaĉis al ili la multflanka instruado kaj la diversaj konversacioj kaj tute ne ĝenis la ĉiu-lectona ŝanĝo de la instruisto.

La kurso atingis ankaŭ intereson de la gazetaro: dufoje okazis radiointervjuoj, kaj jaŭde loka ĵurnalistino sekvis la kurson dum preskaŭ unu horo. Artikolo aperis en la loka gazeto *Heinäveden lehti* komence de julio.

La libertempa programo enhavis rondiradon en la monaĥeja areo kaj vizitojn al la kruco de migranto kaj al la monaĥeja tombejo. La rondiradon kaj la tombejan viziton gvidis Jukka Laaksonen ankaŭ Esperante. La vesperaj kunestadoj enhavis ĉi-jare speciale multe da muziko, ni ja havis inter ni membron de *Dolchamar*. Inter la kursanoj estis bonaj kantistoj kaj lerta akordionisto. En la lasta vespero okazis festo kun bongustaj manĝoj en Valamo-stilo kaj amuza programo. Ĝin partoprenis ankaŭ deko da vizitantoj el Finnlando kaj du eĉ el Pollando.


Vendredmatene la kursanoj povis aŭskulti gastpreleganton: Teresa Neme-re rakontis pri Torunaj spickukoj. Multaj komencantaj gelernantoj ĝuis, kiam ili rimarkis, kiel bone ili komprenis la vortojn de Teresa eĉ sen traduko, kiu sekvis finne.

Venontjare estos tempo por la jubilea 10a kurso en Valamo 22–26 jun. Tuj post la kursosemajno estas planita ekskurso al la insulo Valamo sur la lago Ladogo, kie hodiaŭ denove funkcias monaĥejo. Pliajn informojn vi trovos en niaj retpaĝoj www.esperanto.fi.

Tiina Oittinen

OSIEK en malgranda lando

Ĉi-jare IEK (Internacia Esperanto-konferenco) okazis en tre malgranda lando, necesis atlaso por trovi ĝiajn limojn, aŭ ĝian ĉefurbon: Ljubljana, eleganta urbo en la stilo de iama aŭstrahungara imperio. Plie la konferenco okazis en urbeto — ĉu vilaĝego? — Ŝempeter-ĉe-Nova Gorica; ha! Nova Gorica tamen aperas sur mapoj! Krome la temo, Fernando de Diego, ne estis alloga por ĉiuj esperantistoj; kiel ĉiuj grandaj homoj, Diego havis kelkajn verajn amikojn kaj multajn malamikojn. Sed mirakle kelkaj dekoj da homoj, el deko da landoj, alvenis kaj ĝoje kunvivis tutan semajnon en familia etoso de negranda aranĝo, en bela ripoza landeto: kelkaj eĉ restis du-tri pliajn tagojn por pli detala vizito de la regiono.



La unua celo de IEK estas kultura: trakti temon, elektitan du jarojn pli frue, per matenaj prelegoj sekvataj de debatoj.

Antonio Valén estis la stelo de ĉi IEK, li donacis al ni tri prelegojn. Li klarigis detale la tradukarton de Fernando de Diego en poezio. Aliaj tagon, li insistis, kiel gravaj estas la originalaj verkoj de de Diego: la nemalhaveblaj *Pri literatura kritiko* kaj *Pri esperanta tradukarto*, kaj lia bonega lernolibro por hispanoj. En la lasta prelego li rakontis la monumentan, manuskriptan, kvarjaran, laboron de Fernando de Diego super la grandega vortaro hispana-esperanta kaj la malfacilan taskon naski ĝin libroforme, en kiu kunhelpis i.a. fratoj de Fernando kaj Antonio Valén mem. Josef Dörr elektis multajn ekzemplojn por kompari la naturalismon de Fernando de Diego kaj la skemismon de Karolo Piĉ; la posta debato estis aparte vigla. Catherine Kremer revivigis la historian kadron de novelo de Maupassant, *Boule de Suif*, kaj montris la fajnecon de la traduko de Diego. Mi mem komence ne planis partopreni, sed du preleguntoj devis rezigni pri la vojaĝo, mi do decidis

per du prelegoj paroli pri Fernando de Diego, la nelacigebla recenzisto, kaj pri la “elektoj” de Diego, tra panoramo de liaj prozaj tradukoj. Kiel en ĉiu IEK unu prelego estis ekstertema, sed priesperanta: Josip Pleadin bonvolis enkonduki nin en la esperantan literaturon, originalan kaj tradukan, en Kroatio; lia temo estis vasta, oni ŝatus scii pli pri kelkaj aŭtoroj.

La lastan tagon, la ĝenerala asembleo atribuis la OSIEK-premion 2008. Silenta streĉo regis en la salono, kiam oni nombris la voĉdonojn de la lasta baloto, inter Josip Pleadin por *Ordeno de verda plumo* kaj Sergio Pokrovskij por *Komputika leksikono*. Granda aplaŭdo salutis la premiadon de Pokrovskij; li ja de multaj jaroj plurfoje estis inter la favoratoj por la premio. Aliaj sekretaj voĉdonoj okazis: por nova prezidanto de OSIEK (Anne Jausions), nova sekretario (Pál Kozsuch), loko de IEK 2009 (Kondoros, Hungario), temo de IEK 2009 (Humura literaturo en Esperanto).

La organizanto, Višnja Branković, estas aparte dankinda: pro la komforta kaj nekosta studenthejmo kie ni loĝis kaj manĝis, pro la agrabla prelegsalono, pro la atendo de konferencanoj ĉe stacidomo aŭ flughaveno, pro la kurso al komencantoj, pro la invito de aktoro Saša Filipović, pro la ekskursetoj al tradiciaj vilaĝoj kaj unikaj restoracioj, pro ŝia konstanta kvietaj helpemo al ĉiu el ni.

Madeleine de Zilah

SET jubileas, sed...

Ĉi-jare la 50an fojon okazis per tri etapoj la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (Ĉeĥio) sur la sama loko, kion fine de la tria SET-etapo festis kvardeko da ekstendaranoj ĉe sia jam 11a renkontiĝo.

La tendaron organizas esperantistoj, sed oni instruas tie ĉefe la anglan kaj germanan, intereso pri Esperanto estas ankoraŭ malforta. La plej granda nombro da partoprenantoj venis al la unua etapo (70 geknaboj), kie okazis ankaŭ kurso de Esperanto por sep infanoj. Dum la dua etapo estis nur 50 infanoj kaj dum la tria 18, la kurso de Esperanto mankis.

Havas intereson pri la tendaro multaj esperantistoj ekster EU, kiujn ne eblas inviti pro burokrataj kaj financaj postuloj de la ŝtato, tial ili ne povas veni kaj revenigi Esperanton.

Miroslav Malovec

Cseh-metodo: ĉu aktualigenda?

26–30 jul 2008 okazis en la Andreo Cseh-Domo, sidejo de la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) metodologia renkontiĝo por Cseh-instruistoj.

La Estraro de IEI decidis inviti kelkajn el la aktivaj Cseh-instruistoj kaj aliajn pedagogojn por diskuti pri la aktualeco de la metodo, kiel renovigi ĝin kaj kiel plu iri antaŭen.

14 instruistoj el ok landoj analizis la uzon de instruhelpiloj, instrumaterialo kaj ankaŭ de son- kaj bildmaterialo en la Cseh-kursoj. La renkontiĝo estis ankaŭ okazo por interŝanĝo de spertoj kaj prezentado de materialo kreita de la diversaj instruistoj por prezenti kaj/aŭ ekzercigi diversajn gramatikerojn.

En unu el la posttagmezoj, la ĉeestantoj vizitis la Pacpalacon, kies biblioteko posedas ankaŭ kelkajn titolojn en Esperanto.

Atilio Orellana Rojas

Festivalo IRIS

IRIS-Festivalo okazis en Szolnok (Hungario) 7–14 jul kun ĉ. 200 partoprenantoj el Pollando, Francio, Svislando, Serbio, Rumanio, Nov-Zelando kaj Hungario.

La programoj okazis en Esperanto, krom tiuj, kiujn ni ricevis de la urbo. Furoris la studhoroj de Stanisław Mandrak. Okazis ankaŭ tradiciaj kursoj kaj provekzamenoj. En la movada forumo ni konatiĝis kun la Esperanto-movadoj de la menciitaj landoj, kaj kiel aparta lando rolis ankaŭ la virtuala mondo de Esperanto: *Dua Vivo*, *Ipernity* kaj diversaj hompaĝoj. La *Ipernity*-anoj ĉeestis ĉ. 40-ope.

En la interkona vespero prezentis la ĉeestantoj ne nur sin mem, sed ankaŭ la Esperanto-movadon en sia lando kaj en sia ĉirkaŭaĵo. La internacian vesperon rolis dudeko da partoprenantoj (kantolernado, deklamado, ktp.). La lasta vespero rikoltis la plej grandan ridadon per la prezento de hungara esperantista aktoro György Honti kaj per la skeĉado de Stefan MacGill. La partoprenantoj faris tuttagan viziton en la Festivalo Ĉipero en urbo Kecskemét, pri kiu anoncis ankaŭ la lokaj televido kaj gazeto. Evidente nun mi ne rakontos pri ĉiuj programeroj, tamen mi mencias la grupon de esperantistaj pentristoj, kiuj donacis bildojn al la loka Esperanto-grupo.

Fondiĝis la Organiza Komitato de la sekvajara IRIS, okazonta en Tata.

Imre Szabó



Cseh-instruistoj apud la Cseh-domo en Hago

Novajoj el Piktlando

Kviza demando: Kie troviĝas la plej longedaŭra, senrompa serio da kongresoj en Esperantio?

Nu, kredeble neniu certas, sed forta kandidato devas esti la skotlanda kongreso: okazis en junio la 103a, en la ĉefurbo de la altlanda regiono de tiu landeto, Inverness.

Kvankam eta kompare al la najbaro Anglio, Skotlando havas riĉan, plurkulturan historion, al kio kontribuis la praloĝantoj de Britio (el la hodiaŭa Eŭskio, iom surprize), la piktoj, prabritoj (hodiaŭ, kimroj), skotoj (de kiuj devenas la landnomo), angloj kaj saksoj (kaj jutoj kaj frisoj! — kuzoj ĉiuj), irlandanoj (krom la skotoj mem, el norda Irlando), vikingoj, normandoj kaj, pli lastatempe, francoj, italoj, poloj kaj sudazianoj. Verdire, *tartano* da kulturoj!

Ĝis hodiaŭ videblas diferenco inter la gaela altlando kaj la pli anglosaksa-brita ebenejo (kie troviĝas la grandurboj Glasgovo, Edinburgo k.a.). La granda plimulto de la enloĝantoj troviĝas en la suda ebenejo; en la altlando pli abundas ŝafoj kaj tragediaj memoroj.

Tiun buntecon oni do celebris en la 103a skotlanda kongreso per programeroj pri la lingvoj, la literaturo, la muziko kaj la geografio de tiu fascina regiono. Tute konvene do, ke oni signis la okazon per reeldono de la broŝuro *La skota lingvo — hodiaŭ kaj hieraŭ* far Vilĉjo Auld, ikono de la esperanta komunumo en Skotlando. (Tiu libreto haveblas tra la sekretario de la landa asocio: www.skotlando.org.)

Ni esperantanoj ne rajtas kongresi sen ekskursi, ĉu? Tial, obeeme ekskursis la skotlandaj kongresanoj al la kastelo Dunrobin, renoma kaj plej bela sidejo de la dukoj de Sutherland (el la antikva norvega por “sudalando” — nur por vikingoj tiu mondoparto estas “suda”). Tiu aristokrata familio mem montras elementojn gaelan, piktan, britan, anglan kaj normandan, do bone spegulas la historion de la lando kaj la regiono. Malĝoje, ili fifamas kiel unu el la ĉefaj forpelantoj de la gaelaj kamparanoj dum la 19a jarcento, por setligi dekmilojn da ŝafoj: multaj tiuj gaeoj elmigris al Nordameriko, al Aŭstralio kaj Nov-Zelando; la nomo Sutherland tial firenomas tra la tuta mondo. La kastelo tamen belas, la apudmara bieno des pli. Kaj poste oni bankedis en la apuda, katedrala urbeto Dornoch: en gaelaj regionoj, bankedi ampleksas tiom da drinkado kiom da manĝado...

Fama britino iam diris ke ne ekzistas senpaga lunĉo. Certe viaj altlandaj kongresanoj devis pagi la bankedon per morgaŭaj jarkunsido kaj aferkunsido — senalkoholaj kaj senhumuraj okazoj. Jen la lumo kaj la ombro, la brilo kaj la morno de Skotlando, hejmo kaj de Vilĉjo Auld kaj de John Knox (kalvinisma religiulo el al 16a jarcento, rutine kulpigata pro ĉiuj malbeloj, ĉiuj malĝojoj en Skotlando).

Nu, jen la plej lastaj novaĵoj el Piktlando. Kial “Piktlando”? — ĉar kiam Skotlando unuiĝis, antaŭ mil jaroj, la piktoj estis la granda plimulto; la skotoj, tamen, estis la pli ruzaj! (Eble do, por ili, ja ekzistas senpaga manĝo?..)

David Kelso



La Estraro de EDE-Germanio en la tago de la refondo (5 jul 2008). De maldekstre: U. Matthias, A. Schubert, E. Macko, K. Gramelspacher kaj M. Cebulla. (Foto de Ulrich Matthias)

EDE en Germanio ekagis

5 jul en Wiesbaden renkontiĝis Esperanto-aktivuloj por refondi la germanan sekcion de la partio EDE (Eŭropo — Demokratio — Esperanto).

Estraranoj fariĝis Manuel Cebulla (prezidanto), d-ro Eugen Macko kaj d-ro Ulrich Matthias (vicprezidantoj), Konrad Gramelspacher kaj Alfred Schubert. La asocio havas sian sidejon en Wiesbaden kaj baldaŭ post la fondo ĝi registriĝis tie ĉe la tribunalo.

En la sama tago la asocio nomumis siajn kandidatojn por la eŭropaj balotoj 2009. En sekreta voĉdono oni elektis por la lokoj 1 ĝis 11 de la listo la sekvajn kandidatojn:

1. prof. d-ro Reinhard Selten, 2. Manuel Cebulla, 3. d-ro Ulrich Matthias 4. d-ro Eugen Macko, 5. Marianne Buchholz-Maurer, 6. Alfred Schubert, 7. Nan Matthias-Wang, 8. Steffen Eitner, 9. Monika Finnegan-Reuß, 10. Konrad Gramelspacher, 11. Hervey Taunton.

La asocio celas kolekti kvar mil subtenajn subskribojn antaŭ la fino de marto 2009 por rajti partopreni en la balotoj. La formularoj por subskriboj jam estas ricevitaj.

Ĉar EDE estas politika asocio, niaj (impostpagantaj) membroj kaj donacantoj ricevas de la financoficejo kutime 50% de la membrotokizoj aŭ donacoj.

Ulrich Matthias

Naskiĝtago en Berlino

Naskiĝtaga aranĝo de Esperanto en Berlino ĉiusomere okazas. Ĉi-jare la 2an de aŭgusto kolektiĝis 50 geesperantistoj kaj gastoj en la Esperanto-Kulturdomo en Lichtenberg. En la oficejo de

Germana Esperanto-Junularo kaj en la fama “espoteko” (biblioteko kaj arkivo de Esperanto-Ligo Berlino kaj renkontejo de Ĵaŭda Rondo) la alvenintoj estis bonvenigitaj kaj informiĝis pri la nuna funkciado de la Esperanto-Kulturdomo kaj pri ĝia perspektivo.

Meze de apuda bela placo ĉirkaŭ rondforma florbedo la ĉeestantoj aŭskultis muzikajn pecojn de Hartmut Mittag kaj Peter Bäß. Tio kreis la kadron por parolado de la prezidanto de Esperanto-Ligo Berlin, Peter Kühnel, kiu proponis nome de la Ligo doni al tiu ĉi placo la nomon “Zamenhofpark”.

De Lichtenberg oni veturis al urbo-meza “Hackescher Markt” per malnova tramo. La veturo memorigis pri evento en 1908, kiam partoprenintoj de la postkongreso per ses elektraj vagonoj veturis tra la tiutempa oriento de la germana ĉefurbo, fine atingis la Alexanderplatz kaj vespere aŭskultis en la Berlina urbodomo paroladojn de Zamenhof, Grabowski kaj aliaj. Nek la vojo, nek la



tramo entute estis laŭ historia modelo, sed la veturado en 2008 aldonis al la historia atmosfero informojn kaj pri la iama kaj pri la aktuala Esperanto-vivo en Berlino.

Preskaŭ ĉe la vojfino, apud la Berlina urbodomo, oni memorigis pri Zamenhof kaj pri la 4a UK en 1908. En tiu ĉi UK fondiĝis Akademio de Esperanto, ĝi estis la unua kun ŝtatestro kiel Alta Protektanto, unua, kiun partoprenis registaraj reprezentantoj, unua, en kiu kunvenis UEA, unua kun surscenigo de teatraĵo kun profesiaj aktoroj, kiuj cetero venis el Berlino — do UK montranta gravajn sukcesojn de Esperanto-movado. Sekve de la UK estis fondita Saksa Reĝa Esperanto-Instituto kaj Zamenhof estis akceptita kune kun aliaj delegitoj de la Prusa Ministro pri religiaj, klerigaj kaj medicinaj aferoj, d-ro Holle, en Berlino ĉe strato Wilhelmstraße.

En Pola Instituto atendis pliaj interesiĝantoj. Vicdirektorino de Pola Instituto en Berlino Katarzyna Sokołowska salutante la vizitantojn, konstatis, ke jam antaŭe okazis aranĝoj en Pola Instituto kunlabore kun Esperanto-Ligo Berlin kaj emfazis, ke en Eŭropa Komunumo oni tro malofte parolas pri komuna lingvo. Ŝi atentigis pri nunaj preparoj de la 94a UK en Bjalistoko.

Roman Dobrzyński, la aŭtoro de la libro *La Zamenhofstrato* rakontis pri sia konatiĝo kun la nepo de la Esperanto-fondinto Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. Montrado de filmo *Ludovikoj en Brazilo* peris al la publiko imagon pri la filma kreado de Roman Dobrzyński kaj pri la personeco de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof, la ĉefa persono de la prezentata libro.

El sia germana traduko Michael Scherm majstre voĉlegis epizodojn el la libro. Roman Dobrzyński esprimis sian admiron pri traduka laboro de Michael Scherm kaj informis, ke ĝis nun la libro aperis en 16 lingvoj. La aŭtoro kaj la tradukinto respondis demandojn de la publiko. Lia traduko de *La Zamenhofstrato* verŝajne estos eldonita ankoraŭ ĉi-jare.

Fritz Wollenberg

Michael Scherm (en la centro) kaj Roman Dobrzyński en la tramekskurso (Fotis Roland Schnell)

Armena Somero

8–15 jul 2008 en Armenio okazis Esperanta renkontiĝo Armena Somero, kiun partoprenis dudeko da homoj, inter kiuj estis esperantistoj el Irano kaj armenoj kiuj dum longa tempo aŭdis pri Esperanto kaj nun kun plezuro partoprenis la aranĝon, kaj tuj post la aranĝo esprimis deziron lerni Esperanton.

La programo enhavis ekskursojn, vizitadon de rimarkindaj lokoj de Armenio, vesperojn kun interkonatiĝo, rakontojn, Esperantan kantadon, promenadon en Erevano. Dum tri tagoj oni ripozis en pitoreska Stepanavan kun antikva armena arkitekturo.

Levon Davtjan

La Esperanto-urbo dujariĝis!

Ĉirkaŭ 50 personoj el 15 landoj festis 12 jul 2008 la duan datrevenon de la naskiĝo de Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo. Honoraj gastoj estis la prezidanto de la Germana-Esperanto-Asocio, d-ro Rudolf Fischer, kaj la urbestro Gerhard Walter, kiuj afable salutis kaj bondeziris.

Peter Zilvar transdonis je nomo de Germana Esperanto-Centro grandan memormedalon kreitan de la fama germana medalisto Peter Götz Güttler el Dresdeno al Gerhard Walter por la urbo-domo.

Je la fino ni buĉis komune bongustan naskiĝtagotorton. Ni dankas por la nemalmultaj gratulletoj. Dum la tre sukcesa Kulturturisma Semajno okazis multaj fakprelegoj kaj ekskursoj.

ICH

Gasto el Israelo

Inter someraj gastoj de la Esperanto-urbo estis ankaŭ la 22-jara israela artisto Jonathan Kishlov (Yoni), kiu vizitis ankaŭ Berlinon, Lepsikon kaj Dresdenon kaj poste veturis al Prago kaj Vieno.

La juna artisto estas ankaŭ lerta popoldancinstruisto. Li instruis arabajn kaj israelajn popoldancojn en la ĝardeno de Germana Esperanto-Centro / Interkultura Centro Herzberg. Giancarlo Fighiera, kiu tiam estis en la Esperanto-urbo, montris al li la belan urbeton ĉe la nacia parko Harz.

Yoni ĝojis pri esperantlingvaj ŝildoj, surskriboj, indikiloj kaj la atmosfero en la montara ferio-urbo. En parolado kun la urbestro s-ro Gerhard Walter, li esprimis la deziron post kelkaj jaroj translokiĝi al Herzberg.

ICH

Politika solvo de Esperanto

En la Internacia Junulara Kongreso en Szombathely partoprenis EDE-anoj el Francio, Germanio kaj Hungario. Ili faris trifojan informadon pri la politika movado *Eŭropo Demokratio Esperanto*, kiu volas venont-jare partopreni parlamentajn balotojn en kelkaj EU-landoj.

Unue, en siaj prelegoj informis pri la situacio de EDE Thierry Salomon el Hungario, Ulrich Mathias el Germanio, Alex Kadar el Francio kaj Eugen Macko kiel reprezentanto de la EDE-Federacio. Resume: la preparlaboroj por la venont-jaraj EU-balotoj en Francio kaj Germanio komenciĝis. En Hungario verŝajne ne eblos pro la alta barilo por novaj partioj partopreni la balotojn.

Due, en la centro de Szombathely estis farita EDE-informtablo sub sunprotektita tendo. La opinio de urbanoj estis tre pozitiva pri la propono de EDE solvi politike per Esperanto la lingvan problemon de la Eŭropa Unio.

Trie, kadre de la lingva festivalo prezentiĝis EDE per propra tablo apud la tribuno kie okazis la artaj prezentadoj de partoprenantoj el diversaj landoj kaj poste la koncerto de JoMo.

Eugen Macko

Kunfratiĝe en San-Paŭlo

22 jun sukcese okazis unu plia Esperanto-Renkontiĝo en la Urbo San-Paŭlo (ERUSP): kvindek da homoj ĉeestis matene altnivelan prelegon de José Tenório pri “La Komuna Eŭropa Referencokadro” kaj ricevis prospekton, eldonitan de UEA/ILEI, pri tiu grava temo. Oni poste prezentis la agadon de la brazila filio de ILEI.

Posttagmeze, oni aŭskultis belegan kantprezenton de Margareth Aquila. D-ro Floriano Pessoa Filho brile prezentis la temon “Neŭrofiziologio de Altruismo”. La publiko entuziasme demandis kaj komentis. La agrabla, kunfratiĝa renkonto finiĝis per kantoj kaj bongusta lunĉo. La libro-servo de la eldonejo *Oportuno* funkciis dum la tuta tago.

Paulo Sérgio Viana

Piloloj kontraŭ krokodilado

Iniciate de Lorena Esperanto Klubo, okazis 5 jul “subĉiela leciono” en la Domo de Monáho Galvão, en Guaratinguetá. En la domo, kie naskiĝis kaj vivis la unua katolika brazila sanktulo, nun funkcias muzeo.

Ni lernis pri liaj vivo kaj mirakloj — inkluzive pri la famaj resanigaj “piloloj” (buletoj el papero, sur kiuj legiĝas parto de preĝo). Ĉiu vizitanto ricevas kelkajn pilolojn donace. Portante Esperanto-ĉemizojn kaj la verdan standardon, ni kaptis la okazon por informi turistojn kaj oficistojn de la Domo pri nia movado.

Ĉar estis ne turisma vizito, sed konversacia leciono, la grupo kaptis la okazon por praktiki la lingvon kaj lerni novajn vortojn. Ekzemple: kiu estas la ĝusta signifo de la vortoj “pastro”, “pastoro”, “sacerdoto”, “monaĥo”, “diakono”, “imamo”, “mulao” kaj “rabeno”? Kiel oni diras en Esperanto “novena”? Kiel oni tradukas al Esperanto la esprimon “por intercessão de Frei Galvão”? La agrabla programo finiĝis per bongusta lunĉo.

Ĉiuj revenis hejmen kaj englutis siajn pilolojn, kiuj resanigas de... krokodilado!

Paulo Sérgio Viana



Orientaj dancoj en la ĝardeneto de ICH

La Senato bone laboris en Bruselo

Ambaŭ branĉoj de la Parlamento de la Esperanta Civito, la Forumo kaj la Senato, havis siajn sesiojn 25–26 jul 2008 en Bruselo.

Malfermante la sesion de la Senato, la Konsulo, Giorgio Silfer, emfazis, ke dum la lasta jaro la Esperanta Civito estis rimarkinde aktiva en la ekstera politiko: ĝi aliĝis al la kampanjoj kontraŭ la grapolbomboj kaj por la moratorio de la mortopuno, kiuj signis gravajn sukcesojn en la lastaj monatoj; ĝi alprenis kuraĝajn starpunktojn, pri Tibeto kaj Pekino same kiel pri Francisco Franco kaj la UEA-kongreso; ĝi aliĝis al la UNIFEM-alvoko kontraŭ la perforto al virinoj. La Kapitulo komencis la plenumon de diversaj senataj rezolucioj: interalie ĝi produktis la unuan arĝentan jubilean medalon (aŭ moneron), dediĉitan al Zamenhof. La Civito oficiale salutis per propra delegacio, la mondfederisman kongreson kaj la inaŭguron de la Kongreso de la Popoloj.

La Senato definitive aprobis la leĝon pri la familia juro (Lex Valeria). Ĝi diskutis kaj aprobis ankaŭ la leĝopropozonon pri la Esperanta Panteono (Lex Bertilia). La unuanimeco daŭris pri la amendoj al la leĝo pri referendumoj (Lex Referendaria), kiuj enkondukas la enketan referendumon. Sed okaze de la rezolucio pri la agnosko de la Universala Deklaracio pri la Bestaj Rajtoj, prezentita de sen. Jarl Hammarberg, la unuanimeco ĉesis: la Ruĝa grupo voĉdonis kontraŭ, tiel ke la rezolucion aprobis verdanoj kaj blankanoj, sed ne la ruĝa grupestro, sen. Dieter Rooke.

La Forumo dediĉis sian sesion 2008 precipe al la Honortago pri Amikejo. La Honortago ekis per saluto de c-ano Jean-Marie Jacques, ĝenerala sekretario de “Senlime”, la esperanto-societo kiu regule kunvenas en La Calamine, la urbeto de iama Amikejo. La saluton, kun pluraj historiaj referencoj, kompletis bela ekskurso tra la jardekoj kaj tra la lando, per nederlanda 12-minuta filmo. Post la festparolado de la Konsulo, Anjo Amika premiere kantis la poemon *Popol' ni estas, ne movado nura* de la proleta poeto Emeriko Baranayi (Emba).

La asembleo de la paktintoj aprobis amendon al la Pakto, kiu nun estas pli kongrua al la respekto por la virinoj; ĝi akceptis la aliĝon de EFEN, la landa asocio en Niĝerio; ĝi prokrastis la decidon pri Centro Sivron en Jerusalemo.

HeKo



Mia Couto (Mozambiko) kaj Giorgio Silfer (Esperantio) © LF-koop.

Esperanta PEN en la unua WALTIC

“Neniu verkisto en la mondo eskapas elspuri sian identecon inter multoblaj identecoj. En ĉiu kontinento, ĉiu persono estas nacio elfarita de diversaj nacioj. Unu el tiuj nacioj vivas submerge kaj sekundare pro la universo de la skribo. Ĉi tiu kaŝita nacio nomiĝas parol-eco”, — asertis la mozambika verkisto Mia Couto en WALTIC: Internacia Kongreso de la Literaturaj Tradukistoj.

Dum kvar tagoj (28 jun – 2 jul) en Stokholmo sescent aŭtoroj kaj kleruloj, tradukistoj kaj aktivistoj, el naŭdek landoj, manifestis la valoron de vortoj en WALTIC.

Oficiale partoprenis la kongreson delegacio de la Esperanta PEN-Centro, kiun gvidis la nova prezidanto de la Esperanta PEN, Perla Martinelli, kaj konsistigis Jarl Hammarberg, Bertil Nilsson kaj Giorgio Silfer.

Krom la Sveda, nur la Esperanta PEN kapablis partopreni per oficiala delegacio. La Gazetara Servo akceptis oficialan akreditivon por la periodaĵoj *Literatura Foiro*, *Heroldo de Esperanto* kaj *Femina*. Krome, miniekspozicio pri la traduka ĝenro en Esperanto estis vizitebla: fakte la sola, ekster tiuj muntitaj de la LKK kaj alia de la Kembriĝa universitato.

Male ol en la PEN-mondkongreso, en WALTIC ekzistis nur unu laborlingvo: la angla, kiu estas la plej ofte uzata en literatura kaj scienca tradukado.

HeKo



Ruslandanoj tendaris en Ukrainio

Anstataŭ tradiciaj ruslandaj someraj aranĝoj ĉi-jare 1–10 jul okazis IET — Internaciaj Esperanto-Tagnoktoj — en la ripozejo *Raketa* ĉe la kabo Tarĥankut, la plej okcidenta punkto de Krimeo (Ukrainio).

Partoprenis ĉ. 180 personoj, ĉefe el Ukrainio kaj Ruslando; ankaŭ po unu-du el kelkaj aliaj landoj.

Bonŝance, la ripozejo malgrandas, ĉio troviĝas tute apude. Ne estas iuj salonoj — ĉiuj programeroj okazis en libera aero. Kompare kun la pasintjara RET-07 en Primorsko-Aĥtarsk ĉi-foje estis ĉiurilate pli bone. Floranta stepo, belega maro kun mirinde travidebla akvo kaj pitoreskaj rokoj (kie oni tamen devas esti tre singarda!); bongustaj kri-meaj fruktoj kaj vinoj — do vere bonegaj kondiĉoj por ripozo. La mirinda naturo konserviĝis dank’ al tio, ke la loko estas malfacile atingebla, tieaj vojoj aĉas eĉ kompare kun la ruslandaj.

Okazis ekskursoj al “Esperanto-hotelo” en proksima urbeto Ĉernomorskoje, al naturaj vidindaĵoj, al urbo Jevpatorija. Dum la “Tagnoktoj” en la unika subakva muzeo estis instalitaj speciale kreitaj bustoj de L. Zamenhof kaj V. Eroŝenko, lanĉita aleo Esperanto.

Tradiciaj programeroj estis kutimaj: diversnivelaĵoj kursoj, somera universitato, librobutiko, vesperaj koncertoj ktp., la programo ne estis tre streĉa — do restis sufiĉa tempo por ripozi ĉe la maro.

Ĉu la renkontiĝo estos tradicia, dume ne klaras.

Valentin Melnikov

Leviĝanta Bjalistoko

La urbo Bjalistoko antaŭ kelka tempo lanĉis promocian turisman kampanjon en aliaj urboj de Pollando kaj eksterlande. Ekde tiam la urba slogano estas “Wschodzący Białystok” (angle: Rising Białystok, Esperante: Leviĝanta Bjalistoko). Por ĝi oni faris interalie 18-minutan filmon pri valoroj de la urbo en kelkaj lingversioj.

Unue oni planis spektigi la filmon por kongresanoj en Roterdamo, sed pro teknikaj kialoj tio tamen ne eblis. Tamen nenio estas perdita — ĝi spektoblas en la Esperanto-televideo ITVC! Vidu ĝin ĉi tie: http://itvc.pl/?link=szczegoly_klipu.id:1015

Se vi bezonas havi por promociaj celoj la pli bonkvalitan version de la registraĵo, skribu al: esperanto@itvc.pl.

Przemysław Wierzbowski

Jubilea Ĉebalta Printempo

Filio de Pola Esperanto-Asocio en Koszalin regule organizas Ĉebaltajn Esperantistajn Printempojn (ĈEP). Ĝis nun ilin partoprenis 2230 gesamideanoj el preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, kaj ankaŭ el Usono, Japanio kaj Ĉinio.

10–18 jun 2008 okazis en Mielno la tridekta, jubilea, ĈEP kun sepdek partoprenantoj el ok eŭropaj landoj sub la protektado de Mirosław Mikietyński — la prezidanto de Koszalin, kaj Zbigniew Chojiński — la komunumestro de Mielno.

Dum la inaŭguro ĉiuj sidlokoj estis okupitaj de la partoprenantoj kaj gastoj. Czesław Baranowski, prezidanto de koŝalina Filio de PEA kaj ĉeforganizanto de ĈEP ekde 1991, esprimis sian grandan ĝojon pro la alveno de novaj kaj malnovaj gesamideanoj. Okaze de la deka sinsekva aktiva partopreno en ĈEP-oj belegajn diplomojn en verdaj bindaĵoj ricevis: Elżbieta Chwikowska el Bydgoszcz kaj Gunter Ebert el Germanio. Honorajn diplomojn ricevis ankaŭ la direktoro de Sporta Hotelo kaj la komunumestro de Mielno, kiuj ekde la 1993 jaro konstante partoprenas la solenan inaŭguron kaj zorgas pri ĉiutagaj bezonoj de esperantistoj en Mielno. Dum la solenaĵo prenis voĉon ĉiuj invititaj gastoj kaj poste sekvis distra parto de la solenaĵo preparita de Urszula Gierczak kun kantemuloj.

Ĝis la noktomezo daŭris interkona vespero kun dancado ĉe akompano de bona muziko. Bele kantis en Esperanto koŝalina muzikisto Stanisław Stokrocki.

La sekvan tagon komenciĝis realigado de la programo, en kiu troviĝis i. a. ĉiumatena gimnastikado, ĉiutaga lingvoperfektigado (por komencantoj per rekta metodo), kantado, interesaj prelegoj, rakontoj, videofilmoj, fotoprezentaĵoj ktp.

Dum la du ekskursotagoj ĉiuj havis okazon viziti gotikan kastelon en Bytów, promeni tra Koszalin kaj admiru belan ĝardenon en Dobrzyca.

Neforgeseblajn impresojn lasis post si ankaŭ adiaŭa vespero ĉe bivakfajro kun kolbasetrostado, biertrinkado, dancado kaj gaja kantado.

La lastan tagon post la matenmanĝo okazis tradicia sumigo de la aranĝo dum kiu ĉiuj esprimis sian kontenton pro la organiza flanko de ĈEP, pro la interesa programo kaj pro neripetbla esperantista etoso.

Czesław Baranowski



Grupo da ĈEP-partoprenintoj en Koszalin, antaŭ memorŝtono omaĝe al d-ro Ludoviko Zamenhof, starigita en la 1969 jaro.

FREŜO denove freŝigas

26 jun – 2 jul okazis en Olsztyn, post kelkjara paŭzo, FREŜO 2008 (Frusomera Renkonto de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinion). Partoprenis ĝin ĉ. 60 samideanoj el Pollando, Germanio, Hispanio, Litovio, Portugalio kaj Ruslando.

La programo de aranĝo estis ĉefe distra, ripoza kaj turisma. Kadre de ĝi okazis ekskurso al la urbo Frombork (en la norda parto de Pollando, ĉe Vistula enfluejo), en kiu dum multaj jaroj ĝis sia morto loĝis la fama astronomo Koperniko. Krom tio partoprenantoj vizitis ankaŭ la malnovan parton de Olsztyn kun ĝiaj gotikaj vidindaĵoj, promenis tra la universitata urbeto, spektis programon en planetario, pasigis ripoztempon en la apudolŝtina arbarĝardeno, kie ili povis admiru malnovajn arbojn kaj plantojn de diversaj mondpartoj. Dum du vesperoj estis aranĝitaj bivakfajroj kun bigoso, biero kaj kolbasetoj — unu el ili okaze de la nomtago de la prezidantino de Pola Esperanto-Asocio, Halina Komar, kaj de la ĉefa FREŜO-organizanto, Marian Zdankowski.

Kvankam la aranĝo estis plejparte amuza, ne mankis prelegoj. Ili rilatis al du ĝemelaj urboj: Olsztyn kaj Kaliningrado — al iliaj antikvaĵoj, historio kaj nuntempo. Prezitis ilin Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska kaj Halina Gorecka. Irena Łowińska rakontis pri la privata vivo de pola verkisto Vladislao Reymont, kaj Peter Kühnel pri la urba trafiko kaj publika transporto en Berlino. Eduardo Kozyra prezitis sian Esperanto-Angla-Polan Vortaron.

Nekutimaj programeroj dum FREŜO estis renkontiĝoj “Ĉiuj kontraŭ unu” kun Halina Komar, Aleksander Korjenkov, Paulo Branco kaj Marian Zdankowski, dum kiuj la menciitaj esperantistoj respondis diversajn demandojn starigitajn de la publiko.

Karakterizaj por la aranĝo estis ĉiutagaj kvizoj kun diversaj premioj, lerte kaj amuze gvidataj de Marian Zdankowski, konata en la pola esperantistaro kiel la Kvizulo. En tiuj ĉi kvizoj la unuan premion gajnis Mirosława Kubicka el Pollando, la duan premion Diamantè Aniĉienė el Litovio, kaj la trian Paulo Branco el Portugalio (nuntempe loĝanta en Bruselo).

Dum la solena vespermanĝo en la restoracio *Kolorowa* krom babilado spontane aŭdiĝis kantoj en la lingvoj Esperanto, germana, hispana, portugala, pola kaj deklamado en la litova. Tiamaniere riĉiĝis la programon eksterlandaj gastoj.

Antaŭ la fermo prezentiĝis junularaj dancgrupoj *Baby Jagi* (Sorĉistinoj) kaj *Rytmix* el Bydgoszcz, kiuj haltis en Olsztyn veturante al BET en Latvio.

La partoprenantoj povis ankaŭ ĉeesti en artaj programoj kadre de Olŝtina Arta Somero, ekzemple: orgena koncerto en la katedralo kaj prezentado de olŝtinaj artistoj en la rekonstruita amfiteatro ĉe la kastelo.

La olŝtina esperantistaro planas venontjare denove organizi similan aranĝon kaj jam nun invitas legantojn de *La Ondo* partopreni ĝin.

Elżbieta Leonowicz-Frenszkowska
Adam Frenszkowski

Unufraze

★ La Komitato de UEA elektis en Roterdamo novan Elektan Komisionon (Renato Corsetti, Lucy Harmon k Ileana Schröder), kiu preparos la elektojn de nova estraro en 2010. (*Jubileanto*)

★ La Komitato de UEA elektis s-ron Simo Milojević kiel Honoran Membron de UEA, kiu ekde 1974 ĝis 2002 laboris en la Centra Oficejo de UEA, i.a., kiel la redaktoro de *Esperanto* k kiel ĝenerala direktoro de UEA. (GK UEA)

★ Asocio Nacia por Esperanto en Burundio estas akceptita kiel nova landa asocio de UEA. (*Jubileanto*)

★ Per interna referendumo, la asembleo de Esperantlingva Verkista Asocio dum UK-93 en Roterdamo decidis malfondi la asocion k tuj fondi la Literaturan Akademion de Esperanto. (HeKo)

★ En la Oratora Konkurso de la 93a UK la unuan premion gajnis Daniel Moreno Martinez el Meksiko pro parolado pri la temo “Ĉu oni devas kontraŭbatali la malaperon de lingvoj?” (GK UEA)

★ Przemek Grybowski, instruisto el Pedagogia Universitato en Bydgoszcz (Pollando), gvidis somere diversnivelaĵn E-kursojn en Vjetnamio, i.a. en kafejo Goc Viet, Kim Lien kvartalo, Vjetnama Unio de Amikecaj rilatoj, duagrada mezlernejo Nguyen Sieu; inter la kursanoj estis ankaŭ helpantoj-volontuloj de la pasintjara IJK en Vjetnamio. (Landa Agado)

★ En la plej grava ĵurnalo de Peruo, *El Comercio*, 27 jun aperis preskaŭ tutpaĝa artikolo pri Eo. (Landa Agado)

★ Juna irana e-isto Kasra Ahmadi gajnis oran medalon en la 49a matematika olimpiko en Hispanio. (Landa Agado)

★ 12 jun okazis la 2a Mongola E-Kongreso en Sojol Erdem Universitato en Ulanbatoro kun la ĉeftemo “Ni efektiviĝu E-Movadon en Mongolio”. (*Esperanto en Azio*)

★ Laŭ la raporto de la Plenumkomitato de SAT, nur 686 membroj pagis sian kotizon al SAT en 2007, dum SAT-Amikaro en Franclingvio havis pasint-jare 716 membrojn; SAT k la asocio E@I pristudas la efektiveblecon de elektronika versio de PIV. (*Sennaciulo*)

★ E-klubo ekfunkciis en lernejo Cavalier Drive en Lower Sackville, antaŭurbo de Halifaxo (Kanado); ĝi jam okazigis letervesperon k kantoinstruadon. (*Lumo*)

★ 7 jun formiĝis en Wattala la unua filio de Srilanka E-Asocio; ĝin prezidas f-ino Shenori Marasinghe. (*Esperanto en Azio*)



Esperanto-kurso en Liaoning Universitato

Liaoning: ekzemplodona instruado

Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA) estas unu el la plej fortaj Esperanto-Asocioj en Ĉinio, precipe pro la amasa superlerneja instruado.

En la printempa sesio finis ekzamenon pli ol 700 studentoj, kiuj elektis Esperanton kiel nedevigan studobjekton en tri universitatoj: pli ol 180 studentoj en Liaoning Universitato, pli ol 180 en Shenyang Muzika Universitato kaj pli ol 360 en Shenyang Universitato. Krome 84 studentoj el Liaoning Universitato ekzameniĝis pri la nedeviga studobjekto “Evolua Historio de Esperanto”.

Jam pli ol 480 studentoj en Shenyang Universitato anoncis sin por la Esperanto-kurso de la venonta semestro.

Wu Guojiang
vicprezidanto de LEA

Ĉe la Stokholma universitato

Antaŭ la someraj ferioj finiĝis la kurso de Esperanto ĉe la Stokholma universitato. Entute estis kvar subkursoj:

1. “Enkonduko al Esperanto”, instruis Sonja kaj Hokan Lundberg;
2. “Interlingvistiko kaj konstruitaj lingvoj”, instruis Hartmut Traummuller;
3. “Profundiĝo en Esperanto”, instruis Sonja;
4. “Pri la kulturo kaj movado de Esperanto”, instruis/gvidis Sonja.

Temis pri “duontempaj” kursoj, po ĉ. 20 horoj semajne, sed en la realo verŝajne neniu studento uzis tiom da tempo. En la unua kaj tria subkursoj la klaso renkontiĝis unu vesperon semajne dum du horoj por aŭskulti prelegetojn kaj aktive ekzerci la lingvon. Inter la renkontiĝoj la studentoj havis hejmtaskojn. En la dua subkurso (pri interlingvistiko) estis pli da ĉeesta instruado (po du prelegoj semajne), kaj en la kvara la studentoj laboris memstare kun nur tri renkontiĝoj por enkonduko, demandoj kaj finaj prezentoj.

El la 30 interesiĝantoj efektive nur 23 enskribiĝis (iuj forfalis pro tempomanko, aliaj pro mankantaj notoj). El la 23 enskribiĝintaj studentoj 13 sukcese trairis skriban kaj buŝan ekzamenojn de la enkonduka kurso.

La enkonduka kurso estis sendepende de la aliaj elektebla kaj sekvebla, kaj parto de la studentoj aliĝis nur al ĝi.

La duan subkurson trairis 6 studentoj farante skriban ekzamenon. Tiuj 6 dum tiu ĉi semestro trairis la trian kaj kvaran subkursojn.

Fine de la tria subkurso la studentoj faris B1- kaj B2-nivelaĵn ekzamenojn de ILEI, ĉiuj sukcese.

Dum la kvara subkurso la studentoj laboris memstare kaj verkis mallongajn laboraĵojn.

Ĝenerale ni kontentas pri la kurso. La kombino de ĉeesta instruado, i.a. per ekzercoj/taskoj el Edukado.net, malĉeesta instruado per “Lernu!” kaj ekzamenado per MONDO (<http://mondo.su.se>) kaj buŝa ekzameno sentiĝis tre bona.

Laŭplane la kurso okazos denove en 2009 se sufiĉe multaj aliĝos al ĝi.

Sonja & Hokan Lundberg

Inter barataj skoltaj

Venkatesh Reddy, reprezentanto de Skolta Esperanto-Ligo en Barato, organizis dektagan Esperanto-kurson kaj lud-programon en St. Joseph Convent School (Whitefield, Bangalore). Pli ol cent gelernantoj, geskoltoj, instruistoj kaj gastoj ĉeestis la programon.

La programo omaĝis la jubileojn de UEA (100 jaroj) kaj de SEL (90 jaroj). La lernantoj jam havis ideojn pri Esperanto sed ne pri la UEA kaj ĝia agado, sed nun ili scias pri la agado kaj ili laboros por disvastigi la celon de Esperanto-movado. S-ino Saranath helpis instrui kantojn al lernantoj. La geskoltoj ludis ludojn uzante Esperantajn vortojn senprobleme.

Venki

Germanaj entreprenistoj kontraŭ la kataluna

Dafydd ab Iago el Hispanio

La lingva diverseco en Hispanio kaŭzas ĉiam pli da problemoj por germanaj entreprenistoj. Peter Moser, ĝenerala direktoro de la Germana Ĉambro de Komerco en Hispanio, argumentas ke ne estas profitdona uzi la katalunan, kiun parolas pli ol naŭ milionoj da homoj laŭ statistiko de la kataluna registaro. Moser publike elpaŝis post kiam la fama futballubo de Barcelona decidis ne flugi per *Air Berlin*, ĉar ĉi tiu germana flugkompanio rifuzis informi katalune pasaĝerojn, flugantajn al aŭ de katalunparolantaj regionoj. “Firmaoj komunikas kun siaj klientoj en la lingvoj, kiuj estas kompreneblaj de la plimulto, kiel la hispana en Hispanio”, — klarigis Moser.

Moser ankaŭ formulis sian negativan opinion pri la politiko de la du el la tri hispanaj regionoj, kie oni parolas la katalunan — Katalunio kaj Balearoj. Moser eĉ invitis la registaron de Balearoj al pripensado pri “la profito kaj malprofito de la lingvaj politikoj kiuj havas la celon limigi la uzon de la hispana”.

El la 1100 germanaj firmaoj en Hispanio, pli ol 380 lokiĝas en Katalunio. En la ĉefurbo de Hispanio, Madrido, estas nur 250 firmaoj. Tamen, laŭ Moser, la katalunparolantaj entreprenistoj devas forgesi sian gepatran lingvon, kiam ili rilatas kun germanaj firmaoj. “La nemultaj kazoj de katalunparolantoj, kiuj ne estas dulingvaj, [t.e. ili parolas la hispanan kaj la katalunan. — d.a.i.] ne pravigas la uzon de la kataluna en ĉiuj komunikoj kun klientoj”, — klarigis Moser en la gazeto *El Mundo*. “Nepras kompreni ĉi tiun politikon en terminoj ekonomikaj: la elspezoj por tradukoj, instruado de dungitoj kaj la produktado de katalunlingvaj dokumentoj kaj presajoj ne estas proporciaj al la nombro da klientoj, kiuj petas tion”, — aldonis la germano.

La Germana Ĉambro de Komerco en Hispanio defendas la direktoron de *Air Berlin*, Joachim Hunold. Antaŭ nelonge la direktoro de la malmultekosta flugkompanio el Berlino ricevis peton de la registaro de Balearoj uzi la oficialan lingvon de



La negativa sinteno de Air Berlin al la kataluna lingvo kaŭzas amasajn protestojn de katalunparolantoj.

la insuloj, nome la katalunan. “Ĉe baza kaj esenca servo, nome, flugoj el kaj al Mallorca, Menorca kaj Eivissa, nepras ke la uzado de la gepatra lingvo estu garantiata al katalunparolantaj civitanoj”, — skribis la baleara registaro al Hunold. “Wow! Mi fieris pri tio, ke ni sukcesis trovi almenaŭ unu hispanparolantan stevardinon por ĉiu interna hispana flugo. Ĉu mi nun organizu katalunlingvajn kursojn al tiuj dungitoj? Kaj ĉu kursojn de la eŭska kaj galega por la flugoj al Galegio kaj Eŭskio? Ĉu neniu tie parolas la hispanan?” — skribis Hunold en la oficiala revuo de la flugkompanio.

“La aŭtonomio, celata de regionaj naciistoj en grandaj partoj de Hispanio, estas remalsaniĝo malantaŭen al mezepoka tempo de malgrandaj ŝtatoj”, — daŭrigis Hunold. Laŭ Joachim Hunold, oni ja povas flegi sian kulturan specifecon en Eŭropo. Tamen la registaro de Balearoj devas konsciiĝi, ke multo de la riĉeco de ĉi tiu regiono venas el eŭropaj subvencioj.

La opinioj de Hunold, subtenitaj de la Germana Ĉambro de Komerco en Hispanio, kaŭzis stormon de protesto en la katalunlingvaj regionoj.

Modernigi prudente

Mi ŝatus reagi al la iom acida artikolo de Andreas Künzli (LODE-165) pri la ĵurnalista kongreso en Vilno, nur pri unu punkto, nome pri la “radioprogramo de Pola Radio”, kiu estus “koncepte modernigenda tutcerte”.

Pro la stilo de la aŭtoro, kiu miksas objektivan kaj subjektivan raportadon, ne eblas al mi konkludi, ĉu tio estas ideo lanĉita de Barbara Pietrzak aŭ privata opinio de s-ro Andreas Künzli.

Mi ĉi tie donu mian privatatan opinion, ke la programoj de Pola radio estas de multaj jaroj konstante modernigataj, kvankam en maniero prudenta. La abrupta duonigo de la redakcio kaj ĉesigo de la mallongonda emisiado alportis defiojn, kiujn la skipo tre profesiece alfrontis.

Mi certe ne havas ĵurnalismajn kompetentojn, sed mi estas uzanto de ĵurnalismaj produktoj: kiam mi legas artikolon, aŭskultas prelegon aŭ elsendon, mi kapablas taksu, ĉu temas pri bone farita laboro. Moderneco en si mem nenion signifas tiurilate.

Marc Bavant (Francio)

Forgesita merito

En *La Ondo de Esperanto* (2008, №6, pĝ. 8) estas tre konciza raporteto pri la Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio, fare de la prezidanto, s-ino Ileana Schrøder.

Laŭ mi estas treege strange, ke la prezidanto de DEA tutsimple “forĝesis” menciis la nomon de la viclernejinspektoro Mogens Rude Andersen el la sendependa Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo. Li ne nur modele ellaboris kaj aranĝis la imponan ekspozicion lige al la 100-jara Jubileo de DEA, sed faris ankaŭ unuhoran brilan prelegon pri la drameca historio malantaŭ la konata Montevidea Unesko-Rezolucio favore al Esperanto (1954).

Poste multaj partoprenintoj de la Jarkunveno esprimis al mi, kiu ne ĉeestis, meritplenajn laŭdajn vortojn pro la grandega laboro, kiun faris Mogens Rude Andersen por sukcesigi la jubilean aranĝon. Pro tio mi trovas la tutan ignoradon de lia nomo en la raporteto tute maljusta. Kvankam li ne estas membro de DEA, publike li meritis tre varman dankon pro sia enorma laboro.

Birthe Lapenna (Danlando)

Herolda forumo sen atento pri evento

Informado al publiko kongresa kaj Vilna

Ni kongresas por si mem, kaj ankaŭ la publiko restas por si mem. Spite-sprite freŝan spliton ne evite mi sin sentas ne krema, sed spitema.

Kiel antaŭ tri jaroj, tiel ankaŭ antaŭ tri monatoj, ne nur la ekstera urba, sed ankaŭ la ena kongresa publiko ne sciigis pri Esperanto. La ĵurnalista kongreso estis por profesiaj informantoj, sed tiuj informis nek nin mem, nek sin mem, nek ilin mem. Kun penso pri publiko Vilna necesis kunporti specimenojn de niaj/siaj periodaĵoj, sed ne estis konsidero eĉ pri varbo de abonantoj — kaj mi vane serĉis la debutan *Spegulon*. En gazetista kongreso mankis gazeta kiosko.

Tutmonda kongreso de heroldoj pri progreso estis la plej konvena tribuno por proklami promocion de nia lingvo, kiu male ol la aliaj naskiĝis ne en voĉo, sed en skribo. Kaj jen, en ĉi forumo mutas la heroldoj kaj ne aŭdas la publiko pri trompiĝo de Esperanto al voĉlibro — formo matura kaj natura. Ja venis printempo — ne per unuopaj hirundoj, sed per tuta svarmo da ili el la buŝo de Stano Marĉek, kaj per la majesta cikonio de William Auld. Sed ĉu la informanta kaj informata publiko aŭdis ilin, ĉu aŭskultis? Ne. Iliaj oreloj restis ŝlositaj por voĉlibro, kaj la termino mem restis fremda, kaj neniu konsciis, ke la alveno de ĉi tekniko malfermas larĝan vojon al nia lingvo kaj literaturo. Kio povis esti esperata de forumo tiom indiferenta, kvankam esperanta, sed unuflanke blinda kaj surda al la unika ŝanco kaj savilo de lingvoj malgrandaj, por el-salti la getton (?).

Mankas al mi vortoj, sed restas la problemo. Antaŭ 40 jaroj en Moskva biblioteko min fascinis per *Iliado* kaj *Dekamerono* la fama rakontisto Suren Koĉarjan, kiu poste produktis voĉe pli ol ducent titolojn da armena klasika literaturo. Mi ne sciis, ke jam de 1962 ekzistis en Litovio voĉlibroj sur magnetofonaj bobenoj, poste kasedoj, sed nur por blinduloj. Eblis aĉeti nur vinildiskojn kun fabeloj por infanoj.

Nur antaŭ 13 jaroj la unuaj “audiopacks”, “audioreaders” kaj “audiobooks” aperis en fremdlingva librovendejo de Vilno, kaj de tiam mi observas la saman snoban antaŭjuĝon de la vasta publiko kontraŭ voĉlibro en ajna lingvo. Oni rekonas ilian ekziston nur en hermeta sfero handikapa, sed malakceptas kiel alternativan aŭ suplementan formon de preslibro. Voĉlibro liberigas, sed kial oni konsideras ĝin getto? Formato mp3 estas mirakle tempo-loko-monoŝpara, facile kopiebla — probable pro tio la profitemaj librovendistoj simple bojkotas la dekon de lastjare aperintaj titoloj litovlingvaj. Sed kial same kondukas la esperanta komunumo? Tro longe ni nur himnis al facila vento. Jam haveblas la necesaj flugiloj — velo de Interreto kaj motoro de voĉlibro, nur streĉu kaj turnu, jam temp’ está! Ne sufiĉas nur apelo, necesas ekzemplo kaj modelo.

Valdas Banaitis (Litovio)

	<p>Radio Esperanto</p> <p><i>Halina kaj Aleksander parolas el Kaliningrado</i></p> <p>Podkasta servo de <i>La Ondo</i></p> <p>Aŭskultu: http://la-ondo.rpod.ru</p>
---	--

Klaus ne kontraŭ Esperanto

En julio ni citis la vortojn de la prezidento de Ĉeĥio, Václav Klaus el la gazeto *Lidové noviny*: “La diferenco inter ĉeĥo, polo, italo, dano kaj eŭropano estas la sama kiel inter la ĉeĥa, pola, itala kaj dana lingvoj kaj Esperanto. Eŭropismo egalas al Esperanto — artefarita, morta lingvo”.

Pluraj esperantistoj sendis al Klaus protestmesaĝojn, kaj 20 jun li respondis al ĉeĥino Jindřiška Drahotová, unu el la protestintoj: “Estimata sinjorino, mia pripenso estis ne pri Esperanto, sed pri demokratio en la nuntempa EU. Kontraŭ Esperanto mi havas nenion”.

Esperanto-instruistoj serĉataj

La vicestro de la Fako pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Nankino, s-ino Cui Kian Hua, kiu respondecas pri pli ol cent fremdlingvaj instruistoj (de la angla, hispana, franca, germana, rusa, japana kaj korea) informas, ke la Universitato volas dungi venontece profesorojn kaj instruistojn, kiuj povas instrui sian denaskan lingvon kaj aldone Esperanton.

Tio kunrilatas kun aliaj flankoj de ŝia strategio: krei plurajn programojn, kiuj utiligos Esperanton kiel kernon. Ekzemple, ŝi jam preparas proponon por tutjara, 500-hora studado de Esperanto por faciligi la lernadon de eŭropaj lingvoj por ĉinoj. Ŝi ankaŭ pristudas la eblon lanĉi novan programon pri turismo, utiligante Esperanton. Kaj finfine, iuj nun parolas pri la eblo starigi universitatan centron en Nankino por eduki kaj trejni Esperanto-instruistojn por la tuta Ĉinio.

Augusto Casquero (Hispanio)

Tro multe da “balbutantoj”

Estus bonveninde grava afero, se oni en LODE *regule* povus mencii jenan fakton: Esperanto — rekonita kiel *literatura lingvo* de la fama Internacia PEN Club! Tio estas multe pli grava por la prestiĝo de Esperanto, ol ekzemple personoj, kiuj naive svingas verdstelajn flagojn. Verŝajne nia mondlingvo estus havinta hodiaŭ pli grandan respekton, prestiĝon, renomon, se nia lingvo estus havinta ekzemple, centojn da Kalocsay-oj, Auld-oj, Boulton-oj. Lerni, apliki Esperanton estas ja pro totala manko de esceptreguloj kaj idiomoj, vere tempogajna, tamen, bedaŭrinde, troviĝas inter esperantoparolantoj ankoraŭ tro multe da “balbutantoj”.

Bertil Englund (Germanio)

Recenzu ĝentile!

Kvankam ne brazilano, tamen mi aliĝas al iliaj protestoj kontraŭ la malĝentila recenzo de Glebo Malcev.

En certa rondo s-ro Malcev estas fama pro siaj majstraj vangofrapoj al la publikopinio. Kaj mi ne kondamnas lin pro tio, ĉar mi konsentas, ke al la hipokrita kaj bigota publikopinio de tempo al tempo necesas doni bonan vangofrapon.

Sed ĉi-foje la frapo de Malcev trafis tute alian celon: sindonemajn esperantistojn. Mi eĉ ne diras, ke por la instruaj filmoj uzendas iom aliaj kriterioj de taksado ol por la artaj. Sed mi ne povas ne diri, ke ekzistas limo inter akra kritiko kaj ofendo. Bedaŭrinde Glebo Malcev tiun limon transiris (kiel en sia recenzo, tiel ankaŭ en sia respondo al la brazilanaj protestoj). Kaj tre bedaŭrinde, ke liaj ofendaj vortoj aperis en tia serioza kaj solida magazino, kia estas *La Ondo*.

Boris Kondratjev (Ruslando)

Sociologie pri UEA

Dum la 93a UK en Roterdamo kunvenintoj enkadre de Sociscienca Esperanto-Grupo (SEG) decidis prepari kaj realigi sociologiajn esplorojn pri UEA.

La Grupo ekestis dum la 90a UK en Vilno (2005). En ĝi estas nek partoprenkotizo, nek speciala organiza strukturo. Ĝisnuna praktiko montras, ke partoprenas la Grupon esperantistoj, kiuj:

1) interesiĝas pri interrilatoj (teoriaj kaj praktikaj) inter sciencoj (nomataj ankaŭ: humanismaj sciencoj, kultursciencoj) kaj Esperanto kiel aparta socia fenomeno (lingvo, movado, komunumo); 2) interesiĝas pri interdisciplinaj sociosciencaj scioj, konoj kaj praktiko; 3) interesiĝas pri apliko de sociscienca scio, kono kaj esplorpraktiko; interŝanĝo de informoj kaj bonaj esplorpraktikoj koncerne al la esplorado de socia medio de esperantistoj kaj popularigado de la socisciencoj en ĝi.

La Grupon konsistigas reprezentantoj de sciencoj (sciencaj laboristoj, studentoj) kaj reprezentantoj de larĝe komprenata socia praktiko (ekzemple, ĵurnalistoj) kaj tiuj kiuj ne okupiĝas profesie pri socia scienca esplorado kaj praktiko, sed serioze interesiĝas pri ili.

23 partoprenantoj (el 14 landoj) de la roterdama SEG-kunveno diskutis pri la propono de esploroj de Zbigniew Galor. La projekto *UEA — la organizo en konscio de siaj membroj* celas realigi enketon kaj intervjuojn dum sekvontjara UK en Bjalistoko kaj esti komparebla kun enketo de Nikola Rašić farita inter la membroj de UEA en la jaro 2000 (sed sen verkitaj finkomentoj).

La planata temo ne estis ĝis nun komplekse esplorata. Al ĝi rilatas fragmente nur tre modesta sociologia bibliografio i.a.: *Esperanto Movement* de P. Forster (1982), *La rondo familia* de N. Rašić (1994), *Kiu parolas Esperanton?* de F. Stocker (1996).

La diskuto pri la esploroj koncentriĝis je demandoj pri konsidero de nemembroj de UEA (ekzemple, eksmembroj), neŭtraleco de UEA kaj ideologieco de la ekstera mondo; uzo de interreto en la esploroj; apartigo de junularo en la movado; financa baro por partopreni kongresojn de UEA.

Aperis ankaŭ la demando pri bezono diferencigi sociologiajn esplorojn kaj la ĝenerale sociscienca (ne nur sociologian) karakteron de la Grupo; kaj kune kun tio bezono krei ĝeneralan kaj apartan terminaron kaj esplor-bibliografion.

La propono elvokis interretan debaton pri sociologia aliro al Esperanto, antaŭ la UK en Roterdamo kaj post ĝi. Siajn interesiĝon kaj opiniojn prezentis ankaŭ tiuj, kiuj ne povis partopreni la SEG-kunvenon.

La partoprenantoj akceptis la subajn Decidojn kiel oficialan dokumenton, celante laŭeble larĝe popularigi ĝin.

Zbigniew Galor

DECIDO

Partoprenantoj de la Sociscienca Esperanto-Grupo (SEG) kunvenintaj dum la 93a UK en Roterdamo

konstatas, ke apenaŭ ekzistas sociologiaj esploroj pri la esperantista movado kaj ĝiaj organizoj, kvankam la tempo por la “Esperanto-sociologio” vere venis, ĉar pli ol 100 jarojn da ekzistado de la E-movado ebligas, surbaze de la spertoj, fari esplorojn kaj formuli konkludojn; sen tio evolu-planoj de la movado kaj ĝiaj organizoj povas resti sen bonaj sociaj fundamentoj kreitaj pere de objektivaj sciencaj datumoj;

taksas sociologiajn esplorojn pri *Universala Esperanto-Asocio — organizo en konscio de siaj membroj* tre gravaj, kaj same la analizon de la nuntempa stato kaj sistemajn sociologiajn esplorojn pri la esperantista movado kiel tuto;

entreprenas preparadon antaŭ kaj realigon de esploroj dum la 94a UK en Bjalistoko cele prilabori kaj publikigi iliajn kompleksajn rezultojn en 2010;

rekomendas al reprezentantoj de UEA (kun regionaj komisionoj inkluzive) kaj organizantoj de UK 2009 en Bjalistoko diskonigi informon pri la esploroj kaj helpi en ĝia realigado de organiza flanko;

petas partoprenantojn de UK-2009 en Bjalistoko partopreni la esplorojn per plenigado de enketiloj, respondado dum intervjuoj;

rajtigas kolegojn Zbigniew Galor, Jukka Pietiläinen, Nikola Rašić, Valentin Seguru agi nome de la Grupo cele prepari kaj realigi projekton de la esploroj en daŭra reta konsultigo kun la grupo;

opinias, ke SEG povas iĝi bona forumo por ĉiuj esperantistoj, kiuj okupiĝas fake aŭ interesiĝas serioze pri sciencoj, nomataj ankaŭ humanismaj sciencoj aŭ kultursciencoj.

Partoprenantoj de SEG-kunveno dum la 93a UK en Roterdamo

25.07.2008

4 jul 2008 post suferiga malsano forpasis elstara esperantisto

Prof. Lee Chong-Yeong
(1932–2008)



Doktoriĝinte pri komerca ekonomiko, li laboris kiel ĉefo de la merkatura grupo de la UN-organizo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato. Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj profesoro de AIS. Esperantisto ekde 1948, li estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994–95, 1998–2001), prezidanto de UEA (1995–1998) kaj vicprezidanto de UEA (2001–2004). Li kuniciatis la unuan Nitobe-simpozion (Prago, 1996) kaj la Manifeston de Prago, kaj lanĉis Kampanjon 2000. Honora membro de UEA kaj honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio, laŭreato de ŝtataj medaloj de Ĉinio kaj de Vjetnamio pro firmigo de amikeco de tiuj landoj kun Koreio.

Lee Chong-Yeong verkis kelkajn librojn: *Esperanto en la 21-a jarcento* (2001), *Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento* (en la korea, 2001), *Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj* (2003), *80-jara historio de la korea Esperanto-movado* (en la korea, 2003), *Ridante lernu* (2007), kaj *Elektitaj Zamenhofaj proverboj* (2008).

Sincera kaj malferma li havis multajn geamikojn. Post konatiĝo en la unua *Eŭropo-Azio* (Sverdlovsk, 1991) ankaŭ ni ĝuis lian amikecon kaj helpon. Li estis nia konstanta leganto kaj dum pluraj jaroj li peris *La Ondon* en Koreio.

Ni funebras kaj kondolencas.

HaGo, AlKo



La pano de juna aĝo

La generacio de kvardekjaruloj uzas la deformon el totalismo por atingi siajn interesojn

de Jan Balabán

En kesto antaŭ la pordo de libra brokantejo, inter la libroj ofertataj al preterpasantoj senpage, mi ekvidis subkonscie konatan titolon — Heinrich Böll *La pano de juna aĝo*. Mi ne povis ĝin preterlasi, la libron ĉe ni eldonitan en la sesdekaj jaroj kaj de cenzoroj forigitan en la jaroj sepdekaj. Rakontoj, kiujn ni iam reciproke pruntadis kiel altvalorajon, kuŝas ĉi tie kiel io havanta eble nur valoron de la papero, sur kiu tio estas presita. Kaj ĉi kesto estas la lasta ŝanco antaŭ papermuelejo. Kun la libro en poŝo mi ekcelis al senhoma kaj senbrua gastejo, en kiun venadis nur urbaj rubaĵistoj, kolektantoj de metalrubo kaj malfeliĉaj perditaj estuloj. Kelkajn horojn mi legis la rakontojn de aŭtoro, kiun niaj komunistoj unue eldonadis, ĉar iliadire li kritikis okcidentan Germanion, sed poste kondamnis, ĉar li parolis favore pri niaj disidentoj. Mi turnadis la paĝojn kaj en tiu post-ideologia momento de historio, kiam bonaj libroj jam ne estas cenzurataj, sed mem falas en rubkestojn, mi denove renkontiĝis kun mia junaĝo.

En la komenco estis ŝtelo

Mi rememoras, kiam mi unuafoje propramane prenis tiun libron. Tio okazis en la popola biblioteko en Ostrava-Vítkovice. Tiam mia frato tie laboris kiel bibliotekisto kaj savadis librojn, kiuj estis destinitaj al likvido, kaj disdonadis ilin al amikoj. Plejparte temis pri la ĉeĥaj aŭtoroj — Jiří Kolář, Josef Škvorecký, Milan Kundera, Ivan Blatný, sed ankaŭ pri la rusaj Aleksandr Solĵenicyn, Boris Pasternak, Boris Pilnjak, Isaak Babel, kaj pri plua elekto de bona literaturo laŭ instinktoj de la Ofico por Preso kaj Informado,

ekzemple Samuel Beckett, Arthur Miller, ankaŭ Jean-Paul Sartre pro lia *Naŭzo* kaj *Uragano super sukero*, traktanta la amikon Fidel.

La kestoj, kiuj estis oficiale sigelataj en la malantaŭa spanspaco* de la biblioteko, estis strukturitaj pli ol la nuntempaj kestoj antaŭ pordoj de brokantejoj, principe ne estis eble trovi en ili malbonan libron. Sed eĉ en la fame konata socialisma malordo estis eble ŝteli nur iom, la pliparton oni devis liveri por papermuelejo, por ke tio ekivalentu almenaŭ laŭ kilogramoj. La nekonskvenco kaj rompeblo de sigeloj, koruptebla de multaj oficistoj kaj forŝtebleblo de komuna posedaĵo formis en la rigida burokrata reĝimo fendojn, tra kiuj estis eble ie akiri bonan libron, por iu enveni universitaton, ie akiri kamionon da brikoj aŭ kelkajn sakojn da cemento. Kiam ni tra ili iomete trapasadis, ni ne koncedis, ke ili, la fendoj, penetras rekte en nian nacian genetikan kodon, ke ankaŭ en la libera socio ili daŭre kondukos onin al grandaj monsumoj kaj al politika potenco.

Rememoro pri Tuzex

Sur la loko de iama popola biblioteko hodiaŭ staras granda benzinstacio de la kompanio Shell, pri kiu oni diras, ke ĝi subtenas la koruptitan reĝimon en la afrika Niĝerio. Kiam mi vidas ĝian firmosignon kun flava konko, mi ĉiam rememoras mian samklasanon en la elementa lernejo Jozefon Paclt, kiu anstataŭ lernejana tornistro portadis nigran kofreton, glukovritan

* Spanspaco. Spaco inter du laŭlongaj port-sistemoj subtenantaj horizontalan konstrukton — tekton (plafonon).

per reklam-etikedoj de la firmaoj Esso, Gulf, Firestone kaj eble Shell, pro kio li estis regule admonata de nia klasa instruistino, kiu al ni vane eksplikadis, ke ĉi tiuj etikedoj propagandas kapitalismon. Jozefo Paclt devenis el la Hlučín-regiono, kiu estas teritorio de iama silezia Prusio, kaj tieaj neekzilitaj (neelpelitaj) germanaj familioj kontaktadis kun la okcidenta Germanio kaj ricevadis de tie markojn, kion al ili la ceteraj enviis.

Havi fremdan valuton estis oficiale malpermesite, sed en pluraj urboj ekzistis obskura vendejo nomata Tuzex, kie homoj por sia neleĝa valuto povis aĉeti duaklasan okcidentan varon. Kiel aspektis tiu unuaklasa, montris al ni Joĉjo Paclt, kiam li malfermis sian okcidentecan kofreton kaj elŝovis el ĝi ampleksan katalogon de la komercaj domoj Neckermann kaj duono de la klasanoj amasiĝis ĉirkaŭ lia benko kaj kun mirego observis la sortimenton, kiu estas nun videbla en ĉiu magazeno. Sed ne ĝuste tiel, hodiaŭ tio estas nur ordinara varo, sed tiam estis la vestaĵoj kaj ceteraj butikaj iluminataj per aŭro de neatingebla, ankaŭ la modelinoj en la reklamoj por mamzonoj, por ni buboj, aspektis iel pli belaj ol niaj bubinoj, kvankam tio certe ne estis vero. Ĉar neniu ja povas esti pli bela ol via bubino. Mi cerbumas, ĉu hodiaŭ similajn katalogojn trarigardas lernantoj en Niĝerio kaj ĉu ili trovas la belulinojn en seks-tolaĵo pli belaj ol estas la niĝeriaj knabinoj. Ĉu ankaŭ ili foje konsciiĝos pri tio, ke la tuta admiro al tio, kion tie (ie en Eŭropo, Ameriko, en la najbara lando) oni havas, propre estas senhonoriga sinmallaŭdo, kiu ĉe ili restos subhaŭte, eĉ se foje, Dio

helpu, venos libero ankaŭ en Niĝerion.

Spirito de Joĉjo Paclt

Kial ĉe ni multaj homoj daŭre ne hontas ŝteli kaj mensogi kaj kial tio tro ne ĝenas la ceterajn? Eble pri tio kulpas la spirito de Joĉjo Paclt, kiu estas penetrinta tutan mian generacion de kvardekjaruloj. Mi rememoras niajn sporadajn renkontiĝojn kun okcidentaj fremduloj, en la tempo de universitata studado. La scenaro de tiuj renkontiĝoj estis ĉiam la sama. Ie en vinejo ni unue nekritike glutadis ĉiujn novaĵojn el la mondo, kaj poste kuraĝigitaj per drinko ni ĝisnaŭze ripetadis, kiel ĉe ni estas ĉio malbona, stulta, teda kaj abomena. Kiel estas ni ĉeĥoj, memkomprene iel pro komunistoj, stultaj, nekapablaj kaj cent jarojn post simioj.

Mizera kuraĝo en tiuj paroloj prezentigis en tio, ke ili estis spegula inverso de la oficiala ŝtata propagando deklaranta, ke ni fartas plej bone en la mondo, ke en Okcidento estas homoj ekspluatataj. Sed tiu “kuraĝo” inversigado de la propagando estis same distanca de la vero kiel la propagando mem. Konstante ni estis sub la influo de potenca mensogo, ĉar dum tiuj paroloj ni vidis nin mem kiel mizerulojn. Tute laŭ la intencoj de komunisma triviala kliŝo, ke la kapitalisman orumon admiras nur primitivulo. Kaj samtempe pri la kapitalismaj atingiĝoj pleje sopiris komunistaj funkciuloj kaj oficiroj de la ŝtata polico mem. Kristnaske ili alportadis al si donacojn el Tuzex kaj siajn pandedomajn loĝejojn ili tegadis per sengustaj aŭstriaĵoj. Eĉ Joĉjo Paclt mem eniris la komunistan partion, por ke li povu studi eksterlandan komercon kaj vojaĝadi al Okcidento.

Tri fazoj de mensogo

Kiel en siaj eseoj montris Václav Havel kaj la pluaj disidentaj filozofoj, en tia situacio lingvo komencas perdi sencon. La unua ŝtupo de la sencoperdado estis la fazo, kiam oni ion parolis kaj ion alian pensis. Tiu taktiko fontis eble el la natura rajto de individuo: ne lasi sin likvidi. Sed la disiro de vortoj kaj pensado ne estas ebla pordaŭre, ĉar ankaŭ la pensado okazas en vortoj. Kiel oni pensas en situacio,



La unua de majo en ĈSSR. Ĉu multaj el ili venis al la stratoj kun la celo sincere demonstrisian solidarecon kun alilandaj laboristoj?..

kiam ekzemple armadon oni nomas *pacbatalo*, okupon de lando *internacia helpo*, grupon de laborevituloj *brigado de socialisma laboro*?

Komence temas pri iaspeca kolektiva interkompreniĝo de subprematoj aŭ de poltronoj, ĉar *oni ja scias, kiel statas la afero*. En tio povas esti eĉ iom da ŝvejk-eca humuro. Uleto, kiu kompilas devigan paroltekston por deviga kunsido, povas uzi *tiujn iliajn* frazfigurojn eĉ kun siaspeca gusto, kaj dum la prelego mem li povas palpebrume vidigi al siaj kolegoj, kiel li al kompartianoj liveris tion laŭ necesa kvoto kaj kiel li samokaze taksas ilin

laŭ sia konscio. Sed poste, kiam la kompartianoj invitas lin en la partion, kaj li ne kapablas rifuzi, ĉar li ja volas resti en la fakultato kaj instrui la germanan literaturon, li diras al siaj kolegoj, nun reale jam estintaj, ke propre li ne estas komunisto, ke li estas nur *ĉe komunistoj*, kaj li denove vulpece palpebrumas, sed nun li jam ne scias precize al kiu.

Tio estas la dua fazo de la sencoperdado, semantika kampo de frazo — *vi ja scias, kiel tio statas* — estiĝas netravidebla eĉ por la parolanto mem. Ĉu ni vere scias, ke li ne estas tiu, kiu li estas? Ke tio, kio estas, fakte ne

estas? Inter vero kaj mensogo ne estas kontinua transiro, sed fendo kaj en tiun fendon nia asistanto de germana literaturo falos en la tria finala fazo, kiam li jam estas konforma al postuloj kaj li mem pensas pri nenio, ĉar li perdis aparaton por pensado. En tiu momento li kutime fariĝas sukcesa kaj mava, siajn studentojn de germana literaturo li ne plu instruas pensi, sed ankaŭ konformiĝi al postuloj. Kaj kiam la reĝimo falas kaj venas libero, tia homo poste neeviteble direktiĝas aŭ al servila servado al iu aŭtoritato en politiko aŭ en komercismo, aŭ male, el inter la novaj nun transponitaj postuloj li mem elektas *siajn legitimajn interesojn*. Imago, ke li povus ekestimi sin mem kaj ĉesigi mensogadon, estas por li fremda, ĉar al li la nocioj vero kaj mensogo reciproke nuliĝis kaj restas nur la interesoj.

Estas bedaŭrinde, ke tiel ĉi formitaj homoj enpaŝis la liberan socion ĝuste en ĝia postmoderna relativisma etapo, kiam la merkata konvinkipovo valoras pli ol vero, kiam interesoj de fortaj grupoj kaj grandaj korporacioj endanĝerigas rajtojn de unuopaj civitanoj kaj de ekonomie malfortaj grupoj kaj kiam politiko fariĝas pli kaj pli ludo de medioj. Ankaŭ ĉi tie lingvo jam komencis perdati sian sencon, ĉar laborantaj homoj estas nomataj *homfontoj*, maldungado estas *raciigado*, komercaj intencoj kaj celado estas *filozofio* kaj sopiro pri profito estas *vizio*. En tiu ĉi situacio la homoj deformitaj per komunisma totalismo subite fariĝas senkompromisaj negociistoj, senkompataj manaĝeroj kaj senskrupulaj politikistoj, por kiuj mensogo kaj korupto estas nur ordinaraj rimedoj por atingi siajn interesojn. La

demokratia socio ilin neniel reformas, male, dirite per nova lingvo, ili *malaltigas la kvaliton de demokratio*.

Eterne junaj kadavroj

Mi trafolumis la Böll-libron ĝis la rakonto *Mia malĝoja vizaĝo*, en kiu, mi supozas, la aŭtoro klopodis priskribi “pacan” socion post hipoteza venko de la Tria Regno. Deviga jubilado aŭ esprimado de tristo, edukado per kolektivo kaj ĉiuj ĉi teruraĵoj, kiujn mi konas ankaŭ el mia junaĝo, ne interesis min tiom, kiel la senespera atmosfero de malpura duone ruinigita haven-urbo, en kiu oni postulas devigan gajadon.

La atmosfero de senperspektiva turpeco estis identa kun tio, kion ni travivadis dum socialismo. La homoj, kiuj tiam iumaniere sukcesis elvojaĝi tiel dire en Okcidenton, akorde asertis, ke dum la reveno ilin okulfrapis ĝenerala malpureco, kadukeco kaj mishumoreco en la vizaĝoj de homoj. Tiu subkonsciata abomeno, pri kiu oni ne plu parolis, sed kiu markadis ĉion. Kaj la plej sufoka estis la konscio, ke tio neniam finiĝos.

Kiam post la dua mondmilito la prezidento Klement Gottwald esprimis sian politikan devizon *Kun Sovetunio je eterna tempo kaj neniam alie*, tio povis soni nur kiel frazfiguro. Sed en lingvo estas ofte esprimita pli, ol ĝia uzanto scias. Ekzemple, ke eterna tempo propre estas neniu tempo. Eterneco ne fluas kaj ne evoluas, tie estas ĉio preta. Ĝi estas nemezurebla stato, kiun nia kristana kulturo ligas kun la finiĝo de surtera vivo kaj kun enfluo de ĉio ekzistanta en la senmezuran union ekster la tempo. Se la “laborista” prezidento deklaris eter-

nan tempon jam ĉi tie sur la tero, fakte li deklaris nuligon de la tempo. La komunisma *junaĝo de la mondo*, poste gvidata de senilaj olduloj, estis destinita por fariĝi junaĝo eterna. Bildo de tia eterna junaĝo estas la mumiigitaj kadavroj de revoluciaj gvidantoj.

Kiel konsiliĝi sen profeto

Nun ni venas al la esenca diferenco, kiun ne aprezas plene la nuntempaj nostalgioj sopirantaj pri la iamaj certecoj, nek la novaj kritikantoj de la nuntempa okcidentmonda socio. La okcidenta socio certe estis ankaŭ deformata per koloniismo, malvarma milito, krizoj kaj per plujaj eksceso laŭjuste riproĉataj, sed ĝi ne estis kvardek jarojn mumiigita ekster tempo.

En la orienta zono komunistoj sukcesis, ankaŭ danke al la febleco de Okcidento, instali reĝimon similan al tiu, kiun planis Hitler por Eŭropo. La dua mondmilito en nia parto de la kontinento finiĝis pere de la venko de unu el la duopo de grandaj sekularaj religioj de la dudeka jarcento, kiu bezonis pliajn kvardek jarojn, antaŭ ol ĝi estis definitive trovita kiel falsa kaj malplena. Estas mistero de la moderna historio, ke eĉ fine de la okdekaj jaroj ne aperis en Oriento, nek en Okcidento, iu novepoka profeto Danielo, kiu ekvidus kaj ankaŭ laŭte dirus, ke potenco de tiu kredo je homo prezentas koloson sur argilaj piedoj, kiun faligos ŝtoneto defalinta de sur monto. Tiu ĉi ekkono venis nur post la falo. Tamen, la suferado de homoj sub la komunisma reĝimo ne devus esti vana, se ni tiun ekkonon ne forgesos, se ĝi ne iĝos vanigita en malsaĝa konsumado aŭ en memcela anarĥio.

El la malplena senbrua gastejo mi eliras en straton plenan de junaj homoj. Kvazaŭ la maljunaj entute malestus, kaj samtempe aŭdeblas, ke estas tro da ili. Kie ili estas? Kie ni estas? La libron mi provos doni al la filo aŭ filino, mi diras al mi. Sed mi dubas, ke ili ĝin legos. Eble ĝi denove falos en iun alian keston kune kun ĉio, kion ni ĉi tie dum duono de nia vivo klopodis koncepti. Tiun panon de nia juna aĝo ni probable devos formanĝi mem.

Tradukis el la ĉeĥa **Jan Werner** (Kun permeso de la aŭtoro)

Jan Balabán naskiĝis 1961 en la moravia distrikta urbo Šumperk, la junaĝon li pasigis en Ostrava. En la Universitato Palacký en Olomouc li studis la anglan kaj la ĉeĥan lingvojn, nuntempe li laboras kiel tradukisto.

Plej konataj estas liaj libroj de rakontoj *Středověk* (Mezepoko) 1995, *Boží lano* (La ŝnurego de Dio) 1998, *Prázdniny* (Ferioj) 1998, *Možná že odcházíme* (Eble, ke ni foriras) 2004, *Jsmě tady — Příběh o deseti povídkách* (Ni estas ĉi tie — Historieto en dek rakontoj) 2006.

Balabán verkis ankaŭ romanojn: *Černý beran* (Nigra virŝafo) 2000, *Kudy šel anděl* (Tra kie iris anĝelo) 2003. Kiel prozisto li en 2005 ricevis la premion *Magnesia Litera* por la libro *Možná že odcházíme*.

La pano de juna aĝo aperis en la revuo *Respekt* (2008, №3, pĝ. 62–63). Ni aperigas ĝin ĉi-kajere, memorante malgajan datrevenon — antaŭ 40 jaroj, en aŭgusto 1968, Sovetunio kaj ties satelitoj sufokis la Pragan Printempon.

La pentateŭko antaŭ la diluvo

Kiel aspektis la perspektivo por esperantisto kiu sentis literaturan ambicion fine de la 1920aj? Malbone.

Por komenci, mankis bona vortaro kaj bona gramatiko. Li povis apogi sin sur la *Universala Vortaro* kaj la *Ekzercaro*, ambaŭ en la *Fundamento*. Li povis ĉerpi frazeologian materialon el la *Proverbaro* de Zamenhof. Li povis legi librojn. Li ne povis trovi abonindan revuon, ĉar *Literatura Mondo* renaskiĝos nur en 1931.

Subite, en 1930, danke al SAT aperas la *Plena Vortaro* de Grosjean-Maupin, kiu enhavas relative abundan frazeologion kaj la ĝisdatigon de UV, laŭ la *Aldonoj*. Sed precipe, ĝi estas esperanta-esperanta vortaro, do alirebla de ĉiuj, inkluzive de tiuj al kiuj mankas serioza vortaro en la propra etnolingvo.

Se en 1931 feniksas *Literatura Mondo*, en la posta jaro Ludoviko Totsche proponas la unuan efektivan literaturkritikan esearon: *De paĝo al paĝo*; dum Kolomano Kalocsay kaj Gaston Waringhien proponas kompletan studon pri la esperanta metriko per *Parnasa Gvidlibro*. Ne multe gravas, ke la satelito de Kalocsay reduktas sian poetikon al panegiro pri sia suno (kaj al atako kontraŭ Julio Baghy): la verko de Totsche malfermas novan epokon, kiun pli ol unu nomos parnasisma, omaĝe al la alia verko.

En 1933 la eldonejo *Literatura Mondo* presas la *Inferon*, per la traduko de Kalocsay. Temas pri lia traduka ĉefverko, inspirita de lia hungara modelo, Mihály Babits: kies versio de la *Dia Komedio* plenumis la ambicion redoni en la hungara tiun sensacon de Stilo Nova, kiun la samtempuloj ricevis legante Danton, antaŭ ses jarcentoj. Bonŝance por nia lingvo, Kalocsay adaptiĝas al tiu modelo (kvankam li haltis post la unua kantiko).

Kaj en 1934 la sama duo produktas la *Plenan Gramatikon*. La analiza studo de la esperanta gramatiko atingas pinton ĝis tiam nekonatan.

En la daŭro de jarkvino la situacio komplete renversiĝis: la vortaro; la literaturkritika debuto; la metriko manlibro; la modelo por la traduka ĝenro; la detala pritrakto de morfologio kaj sintakso. Fariĝi poeto estas nun pli facile: sufiĉas aldoni tion, kion oni devas mem posedi, nome la talenton.

En 1935 la debutantaj esperanto-poetoj povas apogi sin sur kompleta paletro de necesaj tekstoj. La lingvo estas ellern-ebla, gramatike leksike stilistike, en grado ĝis tiam nekonata. Sed ĝuste kiam la menciitaj kvin titoloj ŝajnas inaŭguri novan etapon en nia literaturhistorio, ĉi tiu konas regreson anstataŭ progreso. Post la pentateŭko venas la diluvo.

Ekde 1935 la horizonto nubigas. En 1936 la nazia Germanio definitive malpermesas esperanton, kaj la esperanto-mondo travivas krizon, precipe per la secesio de la plejparto de UEA: naskiĝas Internacia Esperanto-Ligo. Jam antaŭ la baldaŭa mondmilito la situacio iĝas senespera.

La intermilitan periodon mi fermus ĝuste en 1937: el *Mondo kaj koro* de Kalocsay (1921) al *La verda koro* de Baghy (1937). Ĉi-lastaj almenaŭ dum du generacioj estas unu el la plej legataj verkoj, kune kun *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat.

(*El la kurso pri literaturo ĉe la Esperantologia Fakultato de KCE, 2008*).

Giorgio Silfer

Se vi planas partopreni en ARKONES, bonvolu informi nin, kaj vi ricevos la oktobran "Ondon" en Poznań.

Saŝa Ĉjornyj (pseŭdonimo de Aleksandr Glikberg) naskiĝis 1 (13) okt 1880 en granda juda familio en Odeso. Forkurinte el la hejmo, li direktis sin al Peterburgo, kie li vivis en mizero. La gepatroj ignoris liajn helpopetojn, kaj nur hazardo savis lin: al korusa artikolo pri li reagis Konstantin Roŝe, oficisto el Jitomir, kiu perdis sian filon.

Danke al poeziamanto Roŝe la knabo komencis verki, sed nur en 1904 ekaperis liaj poemoj — plejparte satiraj, sarkasmaj, ironiaj. Pro ili li akiris popularecon de publiko kaj atenton de cenzuro, kiu malpermesis lian unuan libron *Diversaj motivoj*. En 1906 li forveturis al Germanio por du jaroj. Reveninte, Saŝa Ĉjornyj kunlaboris en la revuo *Satirikon*, verkis kelkajn poemarojn kaj infanlibrojn.

Post la bolŝevista revolucio li por ĉiam forlasis Ruslandon. En Parizo li kunlaboris en ruslingva gazetaro kaj verkis librojn, precipe por infanoj. Mortis 5 aŭg 1932 en Le Lavandou post estingado de incendio en najbara bieno.



Saŝa Ĉjornyj

Plastika

*El la tend' eliris ino —
Tog' cejana sur figuro,
Kiel kat', atingis akvon
Kaj langvore mergis krurojn.
Kaj deĵetis ŝi andante
L' togon sur la plaĝon gruzan, —
Mi ĝis nun ne vidis geston
Pli gracian kaj pli ruzan!*

*Nur per kvardek farb-siteloj
Eblus pentri la staturon...
Marajn mevojn eĉ mirigis
Form' de l' brakoj kaj femuroj...
Kaj al homo iu ŝajnus,
Kvazaŭ faŭno-drinkŝatanto
Malrapide tuŝas l' koron
Per velura varma ganto.*

*Observante malvarmsange
Tra la skirpo la miraklon,
Mi fumadis mian pipon
Kaj meditis pri l' spektaklo:
Plaĝ' similas al Saharo, —
Do, por kiu ĉi kreaĵo
En la mar' akceptas pozojn
Tentajn tro eĉ en korsaĵo?*

*Kaj al mi respondis l' suno:
"Estas vi stultul'! En valo
Kun neprofitem' mirakla
Malv' demetas la vualon...
En malavarec' eterna
Estas senc' de dia rulo...
Same junulinoj, kara,
Ja gracias sen kalkulo".*

*Mi oscedis kaj subridis...
Mi konjektis: de post l' tendo
Vir' eliris en trikoto,
Akr-skapola, kun pretendo.
Kaj al li renkonten ino
Tuj akceptis tian pozon,
Ke el pipo, misglutinte,
Glutis mi duoblan dozon...*

Tradukis el la rusa Sergej Tiĥonov

Pro ĉi tiu traduko Sergej Tiĥonov iĝis laŭreato de *Liro-2007*.

La dua *Beletra Almanako*



Ses monatojn post la unua *Beletra Almanako* aperis ĝia dua numero, kiu havas la saman strukturon. Ankaŭ en ĝi paradas bona foto, ĉi-foje de Enrique kaj Nuria Cano.

En la sekcio *Originala prozo* per mallongaj rakontoj ĉeestas Filipo Dorcas, Carmell Mallia, Alejandro Cossavella kaj Reinaldo Marcelo Ferreira. Originala poezio ĉeestas per verkoj de Benoît Philippe, Baldur Ragnarsson kaj Mao Zifu. Tradukita literaturo prezentigas per romanfragmento el *Kaprido por du groŝoj* de Grigorij Kanoviĉ, transdonita el la rusa de Tomasz Chmielik, poezia ciklo *Savo al homoj el abismo* de Changyao, elĉinigita de Mao Zifu kaj poemo *Transirante Bruklin-prame* de la fama usona poeto Walt Whitmann, tradukita de Maurice Wittenberg.

Mallongaj poeziaĵoj omaĝas la forpasintajn Claude Piron kaj Rejna de Jong.

En *Kaoso en Esperantio: eĥoj de la holokaŭsto* Humphrey Tonkin analizas kvin esperantlingvajn librojn, kiuj iel-tiel enfokusigas la naziajn kontraŭjudajn teruraĵojn. Trevor Steele klarigas en *Aurelius skribis a. P.* (a. P. = antaŭ Paulo), kial li elektis por sia romano temon jam ekspluatitan eĉ en la internacilingva literaturo. Paul Gubbins esas pri *La esperanta radiodramo: malofta kiel malsolena malfermo*, eksplikante fine principojn de radiodramoverkado. “Simplaj principoj malsimple aplikeblaj — almenaŭ en Esperantujo”. Lian propran provon de radiodramo *Morgaŭ, ĉiam morgaŭ* aperigitan samalmanake juĝu legantoj, ĉu iam ankaŭ aŭskultantoj?

Recenza fako eminentas pro la nomoj de kritikistoj: Carlo Minnaja pri *Samideanoj*, Gonçalo Neves pri *Historio de Esperanto* de Aleksander Korĵenkov, Christian Declerck pri *Ĉiuj dioj estas for* de Ulrich Becker kaj Jorge Camacho pri *Donkiĥoto parolas esperanton* kaj pri tri muzikaj kodoj *jOmO slavumas*, *Supernova* kaj *Pli ol nenio*.

Kiel la lasta tributo de *Belartaj konkursoj 2007* aperas teatraĵo *Aŭto-mato* de Stefan MacGill. Fine estas mallongaj prezentoj de 19 personoj el 15 landoj, kiuj kunkreis la duan *BA*.

Foliumis por vi
Halina Gorecka

Ne en la reto, sed en *La Reto*

La verkistina komitato de PEN Internacia produktas periodaĵon en tri lingvoj (angla, franca, hispana): *Network / Le Réseau / La Red*. La nuna ĉefredaktorino estas Judith Buckrich, Aŭstralio.

La aŭgusta numero dediĉas pozitivan atenton al la esperanta revuo *Femina*, redaktata de Perla Martinelli, kaj al la ĉeesto de la Esperanta PEN en Stokholmo, okaze de WALTIC, la mondkongreso de literaturaj tradukistoj. Efektive la eŭropaj paĝoj estas plejparte dediĉitaj al tiu evento, kun emfazo pri la rolo de virinoj en la esperanto-literaturo, ankaŭ danke al la iniciatoj kadre de la Pakto por la Esperanta Civito.

En la Verkistina PEN-Komitato la esperanto-literaturo estas reprezentata de Marie-France Conde Rey kaj Perla Martinelli. En venonta numero de *La Reto* ili planas aperi koncizan eseon pri nia literaturo. En 2005 la Esperanta PEN, kunlabore kun Kultura Centro Esperantista kaj kun la financa subteno de svisaj neesperantistaj sponsoroj, organizis kolokvon en Ĉaŭdefono, kun la partopreno de pluraj PEN-verkistinoj.

HeKo



Nia Mondo: dulingva libroserio

Ĵus aperis la filozofia libro *Saĝo kiel terapio* en du lingvoj (Esperanto kaj litova) de litova profesoro Jūratė Baranova. Ĝi komencas la serion *Nia Mondo*, en kiu oni intencas prezenti litovajn filozofion, arton kaj kulturon por la tutmonda esperantistaro kaj samtempe disvastigi Esperanton inter la litovoj.

La fondinto de la serio kaj la tradukinto de la unua libro estas Gediminas Degėsys. La libron eldonis la eldonejo *Trys žvaigždutės*. Ĝi havas 352 paĝojn, la tekstojn klarigas 24 ilustraĵoj. *Saĝo kaj terapio* jam estas akirebla ĉe la disvastiga reto Mūsų knyga kaj baldaŭ estos en ĉiu librovendejo de Litovio.

Gediminas Degėsys

Esperanto-teatro

Dum la historio de Esperanto multaj teatraĵoj estis prezentitaj diversloke en la mondo, sed ne multaj teatraĵoj estas origine verkitaj en Esperanto.

En la jaro 2006 je la centjariĝo de Sveda Esperanto-Federacio eldoniĝis *Eduko Danĝera* de Harold Brown — kolekto de dek unu mallongaj teatraĵoj (por unu ĝis tri aktoroj). La teatraĵo *La Jubileo* estas verkita por celebri la centjariĝon de Esperanto-teatro. La faktoj en ĝi baziĝas sur la esploroj de Zofia Banet-Fornalowa pri teatroprezentoj dum UK, kaj ĝin prezentis profesia aktoro Jerzy Fornal dum Kultura Esperanto-Festivalo en Kopenhago (1996). Estis granda sukceso! Pluraj aliaj teatraĵoj el la libro estis prezentitaj diverslande, kelkaj de Jerzy Fornal, aliaj de neprofesiaj aktoroj.

La Stokholma klubo uzas la libron *Eduko Danĝera* kiel diskut-temon por konversacia kurso. Ni traegas la teatraĵojn kaj diskutas la tekston. Poste ni diskutas la enhavon kaj la personojn de la teatraĵoj, kiel ili kondukas, kial ili agas tiel, kiel ili faras. La teatraĵoj estas mallongaj kaj oni povas tralegi la tuton dum unu kunveno. Ni havas interesajn kaj viglajn diskutojn bazitajn sur psikologiaj aspektoj kaj propraj spertoj. La tekstoj temas pri la homa vivo, pri malfacilaĵoj kaj ĝojoj. La libro estas rekomendinda por trastudo en kursgrupoj, ĉar la enhavo kreas multajn diskut-nivelejn. Eble kelkaj en la grupo deziras fari etan prezenton de iu teksto.

Dum la laboro pri la libro iuj ekhavis la ideon traduki la teatraĵojn *La Pesto*, origine verkitan en Esperanto, en diversajn naciajn lingvojn. La tradukantoj estas spertaj esperantistoj, kelkaj estas tradukistoj al Esperanto. Mi opinias, ke estas interesa ideo traduki origine esperantan tekston en diversajn lingvojn. Tiel eblas por ne Esperanto-parolantoj legi la teatraĵojn en sia propra lingvo.

Dezirantoj traduki *La Pesto* en sian nacian lingvon, bv kontakti Kerstin Rohdin Lejonets Gata 381 5tr, SE 136 60 Haninge, Svedio.

Oni povas aĉeti la libron je la sama adreso kontraŭ 12 eŭroj (unu ekz.) kaj kontraŭ 9 eŭroj (3 ekz. aŭ pli) + sendokosto.

Legu *La Peston* en Esperanto kaj en diversaj tradukoj jam ricevitaĵe rete ĉe: <http://harold-brown-author-verkisto.webs.com>

Kerstin Rohdin

Napolo, ne nur la kanzono...

Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro): Gvidlibro / Kompilis Nicolino Rossi. — Napoli: Napola Esperanto-Asocio, 2008. — 192 pĝ., il.


La nomo Napolo en la tuta mondo asociiĝas kun la *napola kanzono*, kiu estis kantata ĉie de nostalgiplenaj elmi-grintoj kaj de popularaj kantistoj, kiel la famekonata tenoro Enrico Caruso. La napola kanzono fontis el popolmuziko, kaj ĝia floriĝo ampleksas la duan duonon de la 19a kaj la unuan de la 20a jarcentoj. En tiu tempo famaj lokaj poetoj kaj muzikistoj verkis sennombrajn kanzonojn. La festo *Piedigrotta* estis ideala preteksto por prezenti publike novajn kanzonojn. La unua vaste populariĝinta melodio estis *Te voglio bene assaje*.

Sed kio vere estas Napolo, oni ekkonas el la recenzata gvidlibro, kiu ne vane havas la subtitolon “Historio, arto kaj folkloro”. Ĝin inaŭguras la historia arbo de Napolo, kiu prezentas kronologie periodojn de ĝia evoluo: de la fondo de Neapolis far grekoj ĉ. 650 a. K. ĝis la jaro 1948, kiam ĉesis la Itala regno sub la Savoja dinastio.

La tekstojn ellaboris Nicolino Rossi, kies poezia gusto precipe sentiĝas en la prihistoriaj ĉapitroj de la libro. Ĝi komenciĝas per la ekesto de Napolo, kiel tion transdonas belaj mitoj. Oni diras ankaŭ, ke la tuta beleco disdonata de Dio post kreado de la tero, trafis Napolon. Volonte oni kredas tiun legendon spertante altiriĝon de la naturbeleco kaj de milda klimato.

Laŭ kompetentuloj, la mediteraneaĵoj urboj “ne elkreskas kiel aliaj el vilaĝoj, sed ili kreas vilaĝojn ĉirkaŭ si kaj por si”. Fondita kiel greka kolonio, la urbo havis tipan strukturon, kiu ankoraŭ nun estas parte videbla, ĉar rekonstruoj kaj plilarĝigoj de domoj kaj palacoj okazis sur malnovegaj strukturoj sen detruo ilin. Dum la romia epoko Napolo iĝis centro de ripozado, sur la marbordo konstruiĝis vilaĝoj, en la urbo mem ekfloris produktado de luksaj varoj.

Dum la Mezepoko Napolo spertis multajn ŝanĝojn sub regado de diversaj konkerantoj, fariĝinte vera ĉefurbo. Ne vane Predrag Matvejević asertas, ke “la praloĝantoj de la mediteranea spaco pli sentas sin ligitaj kun sia urbo ol kun ŝtato aŭ nacio... La urboj estis por ili ŝtato, nacio kaj io pli”. Tion konfirmas la historio de Napolo, kiun leganto sekvas per la atentokaptaj ĉapitroj.



Kun admiro Rossi rakontas pri la plej brila epoko, kiun Napolo spertis sub la regado de princo Karlo (Burbono), poste hispana reĝo Karlo III, klera kaj artama, laŭ la iluminisma spirito. Napolo iĝis la plej loĝantoriĉa urbo en Italio, estis faritaj plibonigoj kaj revigligo de ekonomiaj kaj administraj strukturoj; komenciĝis elfosadoj en Herkulano kaj Pompejo, fonditaj la Nacia Biblioteko, Arkeologia Muzeo, konstruita Teatro San Carlo. Disvolviĝas kulturo. Kaj amare li konstatas ruinigajn postsekvojn de la malvenko de *Partenopa Respubliko* (1799), kiam estis neniigita la plej bona parto de la napola intelektularo:

Napolo neniam plu estos kapabla atingi similan spiritan kaj kulturalan floran, la vivo de la urbo kaj de la ŝtato ekiris al decida kaj nehaltigebla subiro.

En 1860 Napolo entuziasme aliĝis al la Itala regno, kvankam tio havigis poste al la urbo amarajn postsekvojn per akriĝintaj urbo-problemoj: higienaj-sanitaraj kondiĉoj, labormanko, alfabetigo. La *suditala problem*o iĝis pli kaj pli akra, la popolo daŭre mizeriĝis, la grandaj elmigrofluoj (precipe al Usono kaj Argentino) komenciĝis. Aparta ĉapitro gvidas legantojn al la hodiaŭa Napolo, ekde la postmilitaj rekonstruoj, tra ekonomia eksplodo de la 1960aj jaroj al la nuno kun ties strebo revalorigi kaj plibeligi la arttrezorojn de Napolo kaj

“La Ondo” partoprenos

19 – 21 sep 2008

ARKONES

en Poznań (Pollando)

trovado de novaj dimensioj en, ekzemple, realigo de la Urbo de la Sciencoj en Bagnoli. Malgraŭ la kontraŭdira portreto de Napolo, Rossi optimismas:

La futuro de la urbo plu gravas: la rekonkero de la propra identeco kiel rezulto de buntaj kaj plurspecaj soci-tavoloj ankoraŭ difineblas.

La Napolano kunkreskis kun sia urbo, kaj kiel ni hodiaŭ trovas la atestojn de pasintaj jarcentoj en la urbaj ŝtonoj kaj artsignoj, tiel plu hodiaŭ aperas en la kolektiva konscio de la urbanoj la signoj kaj atestoj de la homoj kaj de la popoloj, kiuj ĉi tie vivis, suferis kaj luktis.

Tra la tuta libro Rossi donas apartan atenton al la kulturo, kiu en ĉiuj epokoj havis kreivajn periodojn. Alestas elstaraj nomoj en multaj sferoj de la artoj, literaturo, muziko kaj sciencoj.

Prihistoriaj tekstoj intermetiĝas kun ĉapitroj, priskribantaj la urbajn vidindaĵojn. Rossi rakontas pri ĉio: spacoplano kaj konstruado; stiloj, arkitekturo kaj skulptaĵoj; pentraĵoj kaj ornamaĵoj; arkoj, kolonoj, reliefoj kaj bareliefoj; ŝtuparoj, pordegoj kaj turoj; katedraloj kaj kasteloj; palacoj kaj publikaj institucioj. Ni vizitas la antikvajn katakombojn kaj la ĉirkaŭaĵojn de Napolo, inter kiuj Pompejo, “urbo sentempa” kaj Sorrento, “loko de la revoj, urbo de la amo, kie ĉies koro trovas emociojn, ĉies espero alstrebas realiĝon, ĉies deziroj glitas al plenumiĝo” kaj la ĉarmaj insuloj.

La libro estas riĉe ilustrita kaj fine troviĝas informoj utilaj por vizitantoj kaj turistoj. Bonvenus ankaŭ glosaro pri personoj enlibre menciitaj. Ĝi estas valora helpilo por plani kaj efektiviĝi sian viziton pro la klera kaj multscia gvidanto, kiu havigas ne nur necesajn informojn kaj priskribojn, sed transdonas la etoson. Lia celo estas ne nur montri “allogaĵon” por turistoj, sed sentiĝi al la leganto kaj eventuala vizitanto la animon de la urbo, kiu multon travivis kaj kiu estas vivanta organismo.

Miaj rimarkoj estas ĉefe teknikaj. Stranga mallongigo “Jarc” anstataŭ la kutima “je” por jarcento; troa uzado de majuskloj, eĉ por sociklasoj kiel nobelaro kaj klerikaro. Nesufiĉe profesia enpaĝigo ĝenas plurloke, ankaŭ per mallertaj vortodividoj.

Estontaj (kaj praktikantaj) ĉiĉeronoj povas uzi la gvidlibron por alproprigi elegantan uzadon de fakaj terminoj. Ĉiuj aliaj kiel interesege legantoj pri la historio, arto kaj kulturo de aparta mediteranea perlo.

Halina Gorecka

La muzika somero en Esperantujo

La Esperanta vivo kaj kulturo impete ampleksiĝas en la reto kaj ne eblas neglekti tiun aspekton de la Esperanto-kulturo... Pluraj bandoj kaj artistoj aliĝis al Myspace kaj Ipernity kaj aldonis Esperanto-muzikojn en siaj paĝoj.

Miaspaco — spaco por muziko

Mayoma Diankembo estas aŭtoro kaj komponisto el Kinŝaso en Kongo kies kvin kantoj estis interpretitaj de JoMo kaj David Gaines. <http://www.myspace.com/mayomadiankembo>

Alejandro Cossavella, argentina artisto (kantisto kaj gitaristo de la *Porkoj* kaj *Strika Tango*) finfine malfermis paĝon ĉe Miaspaco kun tute novaj muzikoj kaj ankaŭ kun video de tanga kanto por la varbado de la turneo en Eŭropo (Belgio, Nederlando, Francio kaj Germanio), kiu komenciĝos en ARKONES (Poznań, Pollando) en septembro. <http://www.myspace.com/alecossavella>



Alejandro Cossavella

La regea bando *Samadhi* el Baden-Württemberg en Germanio prezentas la Esperanto-kanton *Verda* en video registrita dum IS: <http://www.myspace.com/samadhidub>

La japana eksperimenta artisto *Zemankova* el la urbo Kumamoto prezentas rete la Esperanto-kanton *Pluvo*: <http://www.myspace.com/zemankova>

Rêverie, progresiva folk-bando el Milano, ĵus eldonis albumon kun du Esperanto-kantoj kun la kunlaboro de Anĉjo Fontana. Unu el ili *Kiam alvenos la fino* estas aŭskultebla ĉe: <http://www.myspace.com/reverieweb>

Krio de Morto metalkora bando el Poznano (Pollando) revenas kun tute nova paĝo en kiu aperas la Esperanto-kanto *Mi staras* ankaŭ en videofilmeto aperonta en la nova Esperanto-projekto. <http://www.myspace.com/kriodemorto>

La normandia gotika bando *Azaŭak* publikigis en Miaspaco la Esperanto-kanton *Gotŝajna* ankaŭ en videofilmeto. <http://www.myspace.com/azauxak>

Marco Turco el Mondovia (Italio) estas nova esperantisto kaj drumisto en



du metalaj bandoj *Animae vector* kaj *Atreides*, kiuj registris po du Esperanto-kantoj por siaj respektivaj diskoj *Akero-no* kaj *Venĝo*, kiujn ili prezentis dum IJK en Hungario ĉi-somere. Tiuj kantoj estas la unuaj en tiu pezmetala stilo, eldonitaj en Esperantio... Bona novaĵo por la iam planota *Metala Kompilo!* <http://www.myspace.com/animaevector> <http://www.myspace.com/atreidesmetal>

Bertilo Wennergren kaj lia edzino Birke muzikas kune. Ili lanĉis sin en verkadon kaj komponadon de novaj kantoj laŭ folka stilo... kun Bertilo ĉe gitaro kaj Birke ĉe fluto. Ilia unua provo kun la kanto *La diboĉulo* jam disponeblas en la paĝo de Bertilo ĉe <http://www.ipernity.com/home/bertilow>

Plu en Ipernity

Post Myspace, ankaŭ en Ipernity ekabundas Esperanto-muzikistoj por la plej granda plezuro de la Esperanto-komunumo kiu iom post iom instaliĝas tie dank' al la sukceso de ĝia Esperanta interfacio.

Mi ne listigas ĉiujn adresojn, ĉar jam en la blogo de *Vinilkosmo* estis starigita ĝisdatigita listo de muzikistoj kaj kantistoj, kiuj havas paĝon en Ipernity: <http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/73230>

KEFeto Stafeto

KEF-9 estis prokrastita al julio 2009 pro ĉefe financaj kialoj... tamen estis organizita unutaga KEFeto la 12an de julio en Kopenhago. KEFeto estis tre agrabla kaj etosa renkontiĝo.

Pluraj partoprenantoj ĝuis la okazon labori en la Roskide-festivalo kaj sekve partoprenis la KEFeton kaj ni eĉ profitis ties kuiriston, kiu provizis dum la aranĝo bonegan manĝon...

KEFeto eĉ eta estis vere kultura kun prelegeto pri Esperanto-muziko, verka ateliero, eksteraj ludoj, kino, kaj koncertoj en kiuj eblis ĝui spektaklojn de *Inicialoj DC* el Frankfurto (Germanio), *Espo Despo* el Kopenhago, *La Perdita Generacio* el Svedio kaj *Esperanto de Luxe* (Kim kun sia filo Villads).

Somere okazis multaj kulturaj eventoj, interalie, en la Amerika Kongreso en Kanado kun JoMo, en la Roterdama UK kun multaj diversaj artistoj, en la IJK en Hungario kun Paŭlo Mojajev, JoMo kaj aliaj.

Baldaŭ okazos

ARKONES en Poznano (19–21 sep 2008) kun interalie, Alejandro Cossavella kaj *La Perdita Generacio*.

Kataluna Kongreso en Sabadell (6–8 dec) kun Alejandro Cossavella kaj Martin Wiese.

IS/IF/NR jarŝanĝe en Germanio.

Ago-Semajno jarŝanĝe en Slovakio.

Baldaŭ aperos

Tre baldaŭ aperonta albumo de *La Perdita Generacio* el Hernusando (Svedio) prezentos 13 novajn kantojn, ankaŭ la karaokeajn versiojn. La disko, kiu prezentiĝos premiere en ARKONES, estas kuneldonita de *Vinilkosmo* kaj GKF.

Por sia Eŭropa turneo Alejandro Cossavella preparas KoDiskon, kiun li mem eldonos.

La Pafklik venos en oktobro en la studion de *Vinilkosmo* por albumo de repkantoj... Ĉi tiu unua hiphopa albumo en Esperanto aperos antaŭ la jarfinaj festoj.

La Kopenhaga triopa bando *Espo Despo* sub gvidado de Amir Hadzi-ahmetović preparas sian unuan albumon. La albumo principe ne estos sur Ko-Disko, sed ĝi estos vendata rete. Ankaŭ tio estas premiero en Esperantio.

Flo!



KEFeto Stafeto



Literatura konkurso Liro-2008

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2008*.

Liro-2008 havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduka poezio: *Друзьям* de Pjotr Vjazemskij
4. Traduka prozo (el la rusa): *Бемоль* de Valerij Brjusov
5. Traduka prozo (el la angla): *Aloha Oe* de Jack London

En la branĉoj 1–2 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitaĵojn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2008.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La tekstoj de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://Esperanto.Org/Ondo>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2008. La organizanto ĝis 1 jan 2011 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Sukcesojn!

Halina Gorecka
sekretario de *Liro-2008*

Ricevitaj libroj

Dum kantas infanoj...? [Kantaro] / Komp. Irena Łowińska. — Varsovio: JES, 2007. — 79 pĝ. — [Donaco de Irena Łowińska].

Gvidlibro 2008 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2008. — 96 pĝ., il. — [Donaco de Halina Gorecka].

Jarlibro 2008 / Red. Roy McCoy. — Rotterdam: UEA, 2008. — 284 pĝ., il. — [Donaco de Halina Gorecka].

Kozyra, Edward. *Esperanto-angla-pola vortaro = Esperanto-english-polish dictionary = Esperanto-angielski-polski słownik*. — Malbork: WO-TO, 2007. — 274 pĝ. — [Donaco de Edward Kozyra].

Napolo kaj ties ĉirkaŭaĵoj (Historio, arto, folkloro): Gvidlibro / Komp. Nicolino Rossi. — Napoli: Napola Esperanto-Asocio, 2008. — 192 pĝ., il. — [Recenzo-ekzemplero].

Ridante lernu: [Legolibro] / Komp. Lee Chong-Yeong. — Seulo: Korea Esperanto-Asocio, 2007. — 170 pĝ., il. — [Donaco de Lee Chong-Yeong].

Ricevitaj gazetoj

Beletra Almanako. 2008/2; EAB Update. 2008/42; Esperanta Finnlando. 2008/3; Esperanto USA. 2008/3; Esperanto aktuell. 2008/3; Esperanto en Azio. 2008/60; Esperanto sub la Suda Kruco. 2008/93; Esperanto. 2008/7-8; FREŜO. 2008/39; Femina. 2008/14; Frateco. 2008/79,80; Ĝenerala Informilo. 2008/149,150; Heroldo de Esperanto. 2008/7,8,9; Informilo por Interlingvistoj. 2008/66; Informilo. 2008/7-8; Internaciisto. 2008/2; KAE-Informilo. 2008/63; Komencanto. 2008/1,2,3; La Movado. 2008/688,689; La Ondo de Esperanto. 2008/7; La Revuo Orienta. 2008/5,6; La Sago. 2008/44,45; Le Monde de l'Espéranto. 2008/566; Literatura Foiro. 2008/233; Litova Stelo. 2008/3; Lumo. 2008/1; Mikrofone. 2008/21; Monato. 2008/7,8-9; Okazas. 2008/566; Sennacieca Revuo. 2008/1; Sennaciulo. 2008/5-6; Service de Presse. 2008/44,45; Verda Saksofono. 2008/21.

Gazetoj

Literatura Foiro, 2008, №233

La duonjarcento de *Esperanta antologio* estas la akcento en la junia *Literatura Foiro*. Eseo de Carlo Minnaja rememorigas la jubileon.

La revuo raportas pri la plej impona renkontiĝo de niaj intelektuloj ĉi-jare, la tutmonda kongreso de esperanto-ĵurnalistoj en Vilno: la artikolon de Ljubomir Trifonĉovski ilustras fotoj de Choe Taesok. En la numero trovas lokon ankaŭ la prelego de Zlatoje Martinov "Naciaj literaturoj kaj esperanto kiel literatura medio" prezentita en Vilno.

Literaturaj rubrikaj: Giorgio Silfer pri la Verko de la Jaro 2007, dua parto de la eseo de Nicolino Rossi pri Petrarca, recenzo de Slavko Samotorčan pri la reapero de *Aline* de C. R. Ramuz, premiera specimeno el nova romano de Trevor Steele, originalaj poemoj de Giorgio Silfer, Nikolaj Neĉajev kaj Jaroslav Krolupper, Radosław Nowakowski pri la plej grava en la verkista arto, Carlos Drummond de Andrade en traduko de Aloísio Sartorato. Kaj Franc Georg Rössler komentarias pri traduka poezio.

Teatro kaj kino: Marie-France Conde Rey pri la groteskaj dialogoj de Zora Heide, kaj Giorgio Silfer pri *Malamiko mia*. Novaĵo: esperantisto ludas en nova bendo de la Moskva kinofestivalo — Jordan Slavejkov en *Dzift*, la filmo ĵus ricevinta la Arĝentan Sanktan Georgon antaŭ sia oficiala premiero en Sofio.

La Konsulo de la Esperanta Civito revenigas nin al La Tago de nia lingvo. "Ĉu i/o estas pseŭdolando?" — respondas Anatolo Gonĉarov. Perla Martinelli pri "Kio post la Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro?"

Ĉu Eŭropo estas io pli ol geografia malvero? Respondas Vinko Ošlak.

HeKo

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be


Nur radikoj

Horizontale: 1. Falsa hararo; 3. Bongusta fiŝeto; 5. Elektre ŝarĝita atomo; 6. Tio povas esti el silko, punto; reprezentantoj de certa profesio havas tion el metalo; 8. La plej granda el niaj “gekuzoj”; 10. Konifera folio; 12. “Homa vegetaĵo”; 14. Nepra detalo de gotikaj konstruaĵoj; 15. Alojo por hejmaj kaj orkestraj aĵoj; 16. Komputila termino.

Vertikale: 1. Pentrista ilo; 2. Agmaniero, starigita de longa uzado; 3. Malpeza, pororiĉa substanco el skeleto de maraj animaloj; 4. Tion vidas antaŭ si ĉiuj lernantoj en klasĉambro; 7. Laŭ tio oni ekkonas leonon; 9. Regula interaranĝo; 10. La plej bela florero; 11. “Praavo” de Esperanto; 12. Arbara okpieda sangosuĉanto; 13. Praulo kaj protektanto de antaŭdiaj triboj.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ 15 okt 2008.

Kompilis **Tatjana Auderskaja**



Judaj historietoj

Gajni unu milionon

Juna juda nutraĵvendisto sukcesis akiri aŭdiencon ĉe barono Rotŝild, promesante al lia sekretario, ke li havas brilan ideon. “Mi instruos la baronon kiel lia moŝto povos facile gajni milionon da pundoj”, — li diris al la sekretario. Alvenis la momento kaj la barono demandas la judon:

- Nu, ni aŭdu vian ideon!
- S-ro Rotŝild, mi aŭdis, ke vi deziras edzinigi vian filinon kaj promesas pagi kiel doton du milionojn da pundoj.
- Ĝuste!
- Do, mi pretas edziĝi al ŝi kontraŭ duono de tiu ĉi sumo.

Ke unu el ili mortu!

Kuŝas pia judo en la morto-lito. Li diras al sia edzino:
— Voku la pastron! Mi volas konvertiĝi al kristanismo.
— Vi estis tre pia judo dum via tuta vivo. Kial vi nun volas konvertiĝi?!

— Pli bone, ke unu el ili mortu ol unu el ni! — respondas la mortanto.

El la kolekto de **Josef Shemer**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Tem-trivite sur bretaro putras la Ekciklopedio

La *Ekciklopedion* en la biblioteko de *La Ondo* jam trivis la temo kaj la ofta uzado. (Redakcia bildklarigo en *La Ondo de Esperanto*, 2008, №7, p. 24)

Pacon al civitaj cindroj, aŭ: Cindrofono, civita nekropolo

Sen. Bertil Nilsson proponas la starigon de la panteono de Esperantio: la nova leĝo indikas tiucele la kremaciejon de Ĉaŭdefono, unu el la internacie famaj monumentoj de la secesia stilo. Se la Senato aprobas la proponon, Ĉaŭdefono havos unu plian titolon por roli kiel ĉefurbo en la nova Esperantio. (HeKo 361 7-C, 17 jul 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=603>)

(Tro?) streĉita kordo

[Al la poemo] “Popol’ ni estas, ne movado nura” [de Emba], laŭ la napola melodio de “O sole mio”... Giorgio Silfer... rekomendas la akompanion de korda instrumento, preferre violonĉelo. (HeKo 363 8-A, 31 jul 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=623>; atentigis Kalle Kniivilä)

Fiere kaj biere

Por tio UEA ekzistas, pro tio ĝi faras sian laboron, ĝi kunigas la membrojn por difinita elo... (Humphrey Tonkin, Ĝenerala direktoro de Unesco salutis la kongreson, <http://www.liberafolio.org/2008/roterdamo2>)

Organika kresko

... Ankoraŭfoje pri nia organo... nia organo elkreskos, pliampleksiĝos kaj pliboniĝos. Štern Fiku, Rumanio (*Internacia Ĵurnalistoj*, okt-dec 1958, pĝ. 4.)

Ata/ita en Svedio: funkcianta sed fermita

“Mi bedaŭras ne bonvenigi vin al la ankoraŭ funkcianta *Bon’ Appetito*, la restoracio kiu priservis la Esperanto-Domon” diris c-ano Svensson, posedinto de la restoracio (fermita pro fiskaj motivoj). (HeKo 359 7-B, 28 jun 2008, <http://www.esperantio.net/index.php?id=584>)

En (la revuo?) Esperanto la vortordo estas tute libera

Li sidas kun sia amiko, Abraham Zbar, kaj ambaŭ viroj sur piedoj la tenas ĉapelojn. (Przemysław Wierzbowski. *Esperanta murpentraĵo solene prezentita // Esperanto*, 2008, №7-8, pĝ. 152; rimarkis Ionel Onet)

Ĉu februstaron aŭ cicembron?

Vi povas elekti malmaman monaton en la sekva listo. (http://www.mondakalendaro.org/mapo_julio2008; rimarkis Lu Wunsch)

Sincera task-priskribo

Ernesto Agazzi, ministro pri brutaro... (*Vizitos Kubon prezidento de Urugvajo*, 17 jun 2008, <http://www.cubanoticoj.ain.cu/2008/0617pdteuruguay.htm>)

Plukis **István Ertl**

Esperanto kaj tutmondiĝo



La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Sabadell 6–8 dec 2008.

La Katalunaj Kongresoj kunigas altnivelajn prelegojn kaj riĉan artan programon kun unuarangaj gastoj el diversaj mondopartoj. Krome, okaze de la Internacia Jaro de Lingvoj kaj kvazaŭ antaŭmanĝo, la semajnfino antaŭ la kongreso okazos serio de prelegoj kaj rondaj tabloj en la kataluna pri lingvaj rajtoj, lingva

diverseco kaj lingvoj kaj paco fare de reprezentoj de elstaraj katalunaj organizoj.

Ĉi-jare la kongresa prelegaro ĉefe turnos ĉirkaŭ la temo “Esperanto kaj tutmondiĝo: perspektivoj por la estonto”. La kongreso celas aparte atenti pri la celoj de esperantismo en mondo pliinterdependiĝanta ekonomie, kulture, lingve, ideologie kaj loĝe, tamen atentos ankaŭ aliajn temojn por doni pli grandan diversecon al la prelegoj. Inter la konfirmitaj prelegantoj elstaras la partopreno de Humphrey Tonkin, Ghiridar Rao, Abel Montagut...

Ni ankaŭ deziras atenti kongreseron al iel alia interlingvo: la muziko. Partoprenos la diskeldonisto Floreal Martorell kaj la esperanto-muzikistoj Alejandro Cossavella kaj Martin Wiese (kaj certe kajtielpluanoj ĉeestos la eventon).

Ankaŭ elstaras en la distra programo la dancigo de internaciaj popol-dancoj far la danc-instruisto Mon Cardona kaj la kvalita teatraĵo de Tuluza Teatra Trupo.

Rilate al gastigado, oni povas helpi vin trovi gastejon aŭ hotelon. Ĉi-jare amasloĝejo estas antaŭvidata.

Legu pli: <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2008/>

Ferriol Macip i Bonet

Donacoj

La fondaĵo *Ilaro*, pri kies sukcesa restarigo ni informis en la aprila *Ondo*, ĝis la 17a de aŭgusto ricevis donacojn de sep personoj.

La nuna stato:

Roger Siarri (Francio)	150.00 EUR
Pedro Zurita (Hispanio)	48.00 EUR
Roger Siarri (Francio)	200.00 EUR
Osmo Buller (Nederlando)	35.00 EUR
Bernhard Eichkorn (Germanio)	100.00 EUR
Choe Taesok, Vida Ĉojenĉ (Litovio)	200.00 EUR
Anonima (Ruslando)	6.00 EUR
Sume je 17 aŭg 2008	739.00 EUR

La bezonata sumo estas 850 eŭroj. Nun mankas nur 111 eŭroj ĝis la kompletigo, post kiu ni finfine povos aĉeti novan komputilon.

Ruslandanoj sendu donacojn poŝte al Галина Романовна Горещкая je nia redakcia adreso aŭ banke (petu informojn pri la konto). Alilandaj donacoj estas bonvenaj ĉe nia UEA-konto avko-u. El kelkaj landoj oni povas sendi monon poŝtmandate.

Koran dankon al la donacintoj kaj al la donacintoj!

Halina Gorecka

Aleksander Korjenkov



Germanio. Kadre de la Esperantofesto en Berlino (pĝ. 10) sur placo proksima al la Esperanto-Kulturdomo la prezidento de Esperanto-Ligo Berlin, Peter Kühnel, publike proponis nomi ĉi placon Zamenhofpark. (Foto de Heike Schüssler)



Togolando. Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj (JOTE) okazigis en liceo Saint Michel prelegon por lernantoj kaj instruistoj kaj disdonis informfoliojn dum la prelego. (Jérôme Kouevigan)



Wikipedia. Wikipedia estas reta Esperanto-enciklopedio kun pli ol cent mil artikoloj. La laboro estas farata virtuale, sed en la Roterdama UK kelkaj vikipediaj aktivuloj malvirtualiĝis. De maldekstre: Yves Nevelsteen, Beatrice Allée kaj Ziko van Dijk. (Ziko van Dijk; http://commons.wikimedia.org/wiki/Image:2008-07-26_uk_tri_wikipediistoj.jpg)



Post dek sukcesaj konkursoj (1998–2007) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 11a Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2008.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2009.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Vizaĝoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2010 ekskluzivan rajton uzi la ricev-itajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

***Supre estas foto el malnova itala vilaĝeto de Gianfranco Vignando (Italio)
(3a premio en la deka fotokonkurso)***